
EL POPOLA ĈINIO
7
1976
中国报道





Neelĉerpebla Fonto (lignogravurajo)

# Ĉiam Brilu la Granda Proleta Kultura Revolucio

## —Memore al la deka datreveno de la "Cirkulero" de la 16-a de majo de la Centra Komitato de KPĈ

de la ĵurnalo *Remin Ribao*, la gazeto *Hong Qi* kaj la ĵurnalo *Jiefangjun Bao*

ANTAŬ dek jaroj, la "Cirkulero" de la 16-a de majo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio estis ellaborita sub la persona prezido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Tiu brila marksisma dokumento klarionis la komencon de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj lumigis la vojon de ĝia triumfa antaŭenmarŝo. Hodiaŭ, en la tempo kiam grandaj venkoj estas akiritaj en la batalo por kritiki Deng Hiaŭping kaj rebati la dekstran deviaciisman venton celantan renversi la ĝustajn verdiktojn, varme celebrante la dekan datrevenon de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj restudante la "Cirkuleron", ni pli bone komprenis la necesecon de tiu ĉi revolucio kaj ĝian profundan signifon, kaj estas pli plenaj je memfido por persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro.

La "Cirkulero" naskiĝis en la intensa batalado inter la proleta komandejo estrata de Prezidanto Maŭ kaj la burĝa komandejo kun Liu Ŝaŭki kiel la ĉefo. Ĝi profunde kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, malkaŝis la reakcian esencon de la "Februara Raporta Skizo"[1], refutis diversajn absurdaĵojn de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon rezistantajn kontraŭ la granda kultura revolucio, armis la tutan Partion per marksisma-leninisma teorio pri la klasbatalo kaj proleta diktaturo, kaj alvokis nin malkaŝi kaj kritiki la burĝajn reprezentantojn en la Partio, kaj depreni la parton de gvidanteco uzurpitan de ili. La ellaboro de la "Cirkulero" proklamis la bankroton de la "Februara Raporta Skizo". De tiam, la Granda Proleta Kultura Revolucio impete disvolviĝis.

Prezidanto Maŭ montris: **"La Granda Proleta Kultura Revolucio nepre devas esti kondukita."** Tiu ĉi granda revolucio, preparita por longa tempo, estas neevitebla rezulto de la akra batalado inter la du klasoj, la du vojoj kaj la du linioj. Dum multaj jaroj, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj lia bando freneze antaŭenpuŝis la kontraŭrevolucian reviziisman linion kaj obstine iradis la kapitalisman vojon. Ili plenenergie oponis kontraŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ sur ĉiuj frontoj: Ili bruaĉis, ke

kapitalista "ekspluato havas meriton", kaj ke estas necese "firmigi la novdemokratian ordon", draste fortranĉis grandan nombron da kooperativoj, praktikis "tri pliigojn kaj unu fikson", laŭdis la reakciajn filmojn "Sekreta Historio de King-kortego" kaj "La Vivo de Vu Hjun" kaj rezistis kontraŭ la kritiko al la teatraĵo "Deoficigo de Haj Ĵuj". En tiu tempo, la burĝa komandejo de Liu Ŝaŭki tenis partian gvidantecon, la gvidantecon de kultura kaj propaganda laboroj, kaj tiun de multaj lokoj. En la ideologiaj kaj kulturaj fakoj regataj de ili, inundiĝis kapitalismo, furiozis reviziismo, kaj elkaĝiĝis granda nombro da monstroj kaj demonoj, kiuj plenigis niajn ĵurnalojn, gazetojn, radioelsendojn, librojn kaj diversajn verkaĵojn de literaturo kaj arto. En iuj sferoj de la superstrukturo aperis serioza situacio de diktaturo fare de la burĝaro super la proletaro. Ili plenenergie praktikis materian stimulon, metis premion en komandon kaj instigis popolanojn iri la kapitalisman vojon. La gvidanteco de sufiĉe granda plimulto da fabrikoj kaj entreprenoj ne estis en la manoj de veraj marksistoj kaj laboristaj amasoj. Nia socialisma ekonomia bazo estis ne firma. Se la granda kultura revolucio ne estus kondukata, post nelonga tempo neeviteble aperus tutlanda kontraŭrevolucia restaŭro, nia Partio fariĝus reviziisma partio, kaj la tuta ŝtato ŝanĝus sian koloron.

Per granda marksisma-leninisma akravido, Prezidanto Maŭ ĝustatempe rimarkis la seriozan danĝeron ke la diktaturo de la proletaro estos renversita de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Prezidanto Maŭ montris en la "Cirkulero": **"Tiuj reprezentantaj personoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, la registaron, la armeon kaj diversajn kulturajn rondojn, estas aro da kontraŭrevoluciaj reviziistoj; tuj kiam la kondiĉoj estos maturaj, ili kaptos la regpotencon kaj turnos la diktaturon de la proletaro en la diktaturon de la burĝaro."** En la batalo kontraŭ la dekstra deviaciisma vento celanta renversi la ĝustajn verdiktojn, Prezidanto Maŭ montris ankoraŭ: **"Konduki socialisman revolucion kaj ne scii, kie estas burĝaro. Ĝi ĝuste estas interne de la komunista partio, tio estas, la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Ili ankoraŭ iras la kapitalisman vojon."** Tiuj gravaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ profunde analizis la ŝanĝiĝon de la klasaj rilatoj kaj la karakterizojn de klasbatalo en la periodo de socialismo, elmetis sciencan tezon, ke burĝaro estas interne de la komunista partio, disvolvis Marksismon-Leninismon kaj pluapaŝe klare montris por ni direkton en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro.

En la pasintaj dek jaroj, ni batalis kun Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj Deng Hiaŭping, kaj ĉiuj ĉi tiuj bataloj pruvis, ke burĝaro efektive estas en la komunista partio. La enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estas la ĉefa forto de la burĝaro en batalo kontraŭ la proletaro kaj restaŭro de kapitalismo. Ĉi tie la ŝlosila problemo estas, ke ili estas potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon enŝteliĝintaj en la organojn de la proleta diktaturo. Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj Deng Hiaŭping, la ĉefoj de la reviziisma linio, kiuj posedis sufiĉe grandan parton de la partiaj kaj ŝtataj potencoj, povas turni la instrumenton de la proleta diktaturo en instrumenton de diktaturo super la proletaro, tial ili estas pli ferocaj ol eksterpartia burĝaro en konduko de restaŭro de kapitalismo. Per la kaptitaj potencoj ili povas, varbante perfidulojn kaj formante klikon por servi al siaj propraj interesoj, starigi burĝan komandejon por de supre malsupren formuli kaj efektivigi reviziisman linion. Ili povas plifortigi kaj plivastigi la burĝajn rajtojn, protekti siajn proprajn interesojn, nome, la interesojn de la "altaj oficistoj", kiuj praktikas reviziismon, engluti kaj fordiboĉi grandan kvanton da sociaj riĉaĵoj, senbride entrepreni kapitalismon, subfosi kaj disfaligi la socialismajn produktajn rilatojn. Kovrante sin ĉiam per marksisma-leninisma mantelo kaj tenante diversaspecajn standardojn, ili portempe trompas parton de la homoj kiuj ne konas la veran situacion kaj havas malaltan konscion, por ke la lastaj sekvu ilian reviziisman linion. Unuvorte, ili estas politikaj reprezentantoj de la burĝaro,

kaj en la batalo kontraŭ la proletaro ili estas komandoroj de ĉiuj sociaj fortoj kaj sociaj blokoj kiuj rezistas kontraŭ la socialisma revolucio, malamas kaj subfosas la socialisman konstruadon.

Deng Hiaŭping, la plej granda enpartia pentorifuzanta potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, ludis komandoran rolon en energia agitado de la dekstra deviaciisma vento celanta renversi ĝustajn verdiktojn kaj en la kontraŭrevolucia politika evento sur Tiananmen-placo. Antaŭ la granda kultura revolucio li estis la ĉefo numero 2 de la burĝa komandejo de Liu Ŝaŭki. La granda kultura revolucio frakasis la du burĝajn komandejojn de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kaj li estis kritikita de la amasoj. Tiam li elbuŝigis multe da vortoj pri "pentofarado kaj korektado de eraroj" kaj "neniama renverso de la ĝustaj verdiktoj". Tamen, tuj post kiam li rekomencis laboron kaj enpotenciĝis, li forĵetis sian kamuflon kaj kun dekoble kreskinta malamo kaj centoble pliiĝinta frenezo, aplikis sian tutan sperton de la kontraŭrevolucia politika batalo al atako kontraŭ la Partio kun programo, publika opinio, organizo kaj plano, direktante sian lancpinton kontraŭ nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

"Preni la tri instrukciojn kiel la ĉefĉeneron", tio estis politika programo de Deng Hiaŭping por renversi la ĝustajn verdiktojn kaj restaŭri kapitalismon. Tiu reviziisma programo propagandas teorion de estingiĝo de klasbatalo kaj la teorion de produktaj fortoj, oponas kontraŭ preno de la klasbatalo kiel la ĉefĉenero kaj nei la fundamentan linion de la Partio kaj la necesecon de la granda kultura revolucio. Deng Hiaŭping intencis trudi ĝin al la tuta Partio kaj la tutlanda popolo kiel la "ĝeneralan programon por ĉiuj laboroj" en la venonta longa tempo por pavimi vojon al ĉiuflanka restaŭro de kapitalismo.

"Kapti ideologian pozicion", tio servis kiel preparo de publika opinio por Deng Hiaŭping por renversi la ĝustajn verdiktojn kaj restaŭri kapitalismon. Post kiam li enpotenciĝis, precipe ekde la lastaj julio, aŭgusto kaj septembro, politikaj mensogoj leviĝis ĉie kaj strangaj paroloj cirkuladis abunde en la socio. Ĉio ĉi tio originis el Deng Hiaŭping kaj estis fabrikita de la Mensogo-kolportada Kompanio de Deng Hiaŭping. Per diversaj malnoblaj rimedoj ili energie fabrikis kontraŭrevoluciajn publikajn opiniojn, por miskonduki la popolon kaj krei splitiĝon. Ili direktis sian lancpinton al la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ kaj kriaĉis helpe al Deng Hiaŭping en lia uzurpado de gvidanteco de la Partio kaj ŝtato.

"La unua afero estas kapti gvidantaron", tio estis organiza rimedo aplikita de Deng Hiaŭping por renversi la ĝustajn verdiktojn kaj restaŭri kapitalismon. Li oponis kontraŭ revoluciaj gvidantaroj de triflanka kombiniĝo, atakis kaj ekskluzivis la maljunajn, mezaĝajn kaj junajn kadrojn kiuj persistas en la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kolektis enpartiajn pentorifuzantajn potenctenantojn irantajn kapitalisman vojon kaj metis ilin sur gravajn postenojn por formi "venĝistan taĉmenton" por renversi la ĝustajn verdiktojn kaj restaŭri kapitalismon. Li pene klopodis por restigi en la Partio renegatojn kaj malamikajn agentojn kiuj estis identigitaj en la granda kultura revolucio, por ke ili resursceniĝu iun tagon estonte.

"Fari ĉiuflankan reordigon", tio estis agada plano de Deng Hiaŭping por renversi la ĝustajn verdiktojn kaj restaŭri kapitalismon. Je lia ordono pri reordigo, tuj leviĝis hereza vento por renversi la ĝustajn verdiktojn. Per sia reordigado li celis nuligi la revoluciajn linion kaj politikojn de Prezidanto Maŭ, la fruktojn de la granda kultura revolucio kaj la superecon de la socialisma sistemo. La tiel nomata reordigo estas esence atako kontraŭ la proletaro fare de la burĝaro, kaj estas kapitalisma restaŭro.

Ĉiuj ĉi fiagoj de Deng Hiaŭping estis daŭrigo kaj disvolvo de la reakcia "Februara Raporta Skizo", kiun Prezidanto Maŭ antaŭlonge jam kritikis en la "Cirkulero". Kaj lia "preni la tri instrukciojn kiel la ĉefĉeneron" es-

tas kopio de la reviziisma linio, kiu, kiel montrite en la "Cirkulero", **"komplete neis ke la kelkmiljara historio de la homaro estas historio de klasbatalo, komplete neis la klasbatalon de la proletaro kontraŭ la burĝaro, la revolucion de la proletaro kontraŭ la burĝaro kaj la diktaturon de la proletaro super la burĝaro".** La "Cirkulero" malkovras, ke Peng Ĝen intence fabrikis mensogojn por deviigi la amasojn de la direkto de batalo, kaj akre kondamnis ke la de li elmetita "reĝustigo de laborstilo" celis ataki la proletajn maldekstrulojn kaj protekti la burĝajn dekstrulojn. Per siaj agoj Deng Hiaŭping iris ankoraŭ pli malproksimen. La linio de Deng Hiaŭping estas daŭrigo de la kontraŭrevolucia reviziisma linio antaŭenpuŝita de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ. Se tiu linio estus sekvota, estus nuligitaj ne nur la atingoj de la granda kultura revolucio, sed ankaŭ tiuj de la tuta ĉina revolucio. La kapitalisma vojo prenita de Deng Hiaŭping kondukas ĝuste returne al la duonkolonia kaj duonfeŭda malnova Ĉinio kaj faros Ĉinion dependaĵo de imperiismo kaj socialimperiismo. Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris kritikante la reprezentantojn de la burĝaro en la "Cirkulero": **"Ili estas fidelaj lakeoj de la burĝaro kaj imperiismo. Kune kun la burĝaro kaj imperiismo, ili persistas en la ideologia sistemo de subpremado kaj ekspluatado fare de la burĝaro al la proletaro kaj en la kapitalisma socisistemo, kaj oponas kontraŭ la marksisma-leninisma ideologia sistemo kaj la socialisma socisistemo." "Ilia batalo kontraŭ ni estas batalo de vivo kaj morto, kaj ĉi tie estas nenia egaleco. Tial ankaŭ nia batalo kontraŭ ili povas esti nenio alia ol batalo de vivo kaj morto."**

La grandaj historiaj meritoj de la Granda Proleta Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ estas ĝuste tio, ke ĝi ĝustatempe kaj rezolute frakasis la restaŭran intrigon de la burĝaro interne de la Partio, kritikis ilian kontraŭrevolucian reviziisman linion, reprenis la de ili uzurpitan parton de gvidanteco de la Partio kaj la ŝtato kaj garantiis, ke nia lando marŝos plu antaŭen laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ; kaj ke ĝi solvis kaj teorie kaj praktike la gravan problemon por la nuna internacia komunisma movado kiel firmigi la proletan diktaturon kaj preventi kapitalisman restaŭron. Centmilionoj da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj pli kaj pli profunde komprenas, ke la granda kultura revolucio **"estas tute necesa kaj tre ĝustatempa".** Ili varme huraas: "Bonega estas la granda kultura revolucio!" Nur tia kia Deng Hiaŭping, enpartia pentorifuzanta potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, havas mortan malamon al la granda kultura revolucio. Li obstinis en renverso de la ĝustaj verdiktoj de la granda kultura revolucio kaj reguligo de kontoj kun la granda kultura revolucio, tial li ofendis la plejmulton de la homoj kaj ili ne konsentis kaj ne permesis al li tiel fari. **"Renversi ĝustajn verdiktojn estas kontraŭ la volo de la popolo".** La koroj de la popolo, de la Partio, kaj de la partianoj volas daŭrigon de revolucio kaj oponas kontraŭ restaŭro kaj regreso. Ĝuste pro tio, la granda batalo persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ por rebati la dekstran deviaciisman venton celantan renversi la ĝustajn verdiktojn estas varme subtenata de la tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo, estas konforma al la volo de la popolo kaj ĝojigas la popolon. Tiuj kiuj provas renversi la ĝustajn verdiktojn kaj reguligi kontojn kun la kultura revolucio estas tre izolitaj kaj rapide falis en staton de malsukceso.

Ni jam akiris grandajn venkojn, tamen la batalo ankoraŭ ne finiĝis. La batalo por kritiki la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Deng Hiaŭping ankoraŭ devas esti profunde daŭrigata. Ni absolute ne devas malstreĉi nian batalspiriton. Plenmano da klasaj malamikoj ne volontas konfesi sian malvenkon. Ili studas el sia malvenko taktikon kaj artifikojn kontraŭ ni. Tion la revolucia popolo devas klare koni. Prezidanto Maŭ montris: **"Lenin diris, ke konstrui burĝan ŝtaton sen kapitalistoj estas por protekti la burĝajn rajtojn.** Ni **mem konstruis ĝuste tian landon, malmulte diferencan de la malnova socio, en kiu estas rangoj, okgrada salajrosistemo, distribuado laŭ**

**laboro kaj egalkosta interŝanĝo.**" Se nur tia stato ankoraŭ ekzistas, se nur la klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo ankoraŭ ekzistas kaj la influo de la burĝaro, internacia imperiismo kaj reviziismo ankoraŭ troviĝas, do estos longdaŭra historia fenomeno ke "**enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon ankoraŭ iras la kapitalisman vojon**". Tiel frue kiel je la unua datreveno de la "Cirkulero", Prezidanto Maŭ diris al ni: "**La nuna granda kultura revolucio estas nur la unuafoja, kaj ĝi en la estonteco nepre okazos plurfoje.**" En la batalo kontraŭ la dekstra deviaciisma vento celanta renversi la ĝustajn verdiktojn, Prezidanto Maŭ ankoraŭ montris: "**Post la demokratia revolucio, la laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne haltis, ili volas revolucii. Sed parto de la partianoj ne volas antaŭenmarŝi, iuj posteniĝis, kontraŭstaris la revolucion. Kial? Ĉar ili fariĝis altaj oficistoj kaj volas protekti interesojn de la altaj oficistoj.**" "**Ĉu ankoraŭ estos necesa la revolucio post cent jaroj? Ĉu estos necesa la revolucio post mil jaroj? Ĉiam estos necesa la revolucio. Kaj ĉiam estas parto de la homoj kiuj sentas premitecon, malaltaj oficistoj, lernantoj, laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj ne ŝatas ke altranguloj subpremas ilin kaj tial ili volas revolucion. Ĉu ne vidiĝos plu la kontraŭdiroj post dek mil jaroj? Kiel ne? Ili certe vidiĝos.**" Pro tio ni nepre devas nin prepari ideologie por longdaŭra batalo kontraŭ enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj por daŭrigo de revolucio sub la proleta diktaturo.

Komence de la kuranta jaro Prezidanto Maŭ diris: "**Sen batalo ne povas esti progreso.**" "**Ĉu 800 milionoj da loĝantoj povas sukcesi sen batalo?**" La dek jaroj de la Granda Proleta Kultura Revolucio estas tiuj de nia antaŭenmarŝado en batalo kaj de grandega ŝanĝiĝado de nia lando. Centmilionaj popolanoj studas Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson en la batalo, ege altigis sian konscion pri opono kontraŭ kaj prevento de reviziismo, pri daŭrigo de revolucio, kaj ankoraŭ pli profunden penetris en la korojn de homoj la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Nia Partio fariĝis ankoraŭ pli forta kaj viglecplena post elimino de malfreŝaĵo kaj enpreno de freŝaĵo. En "subteno al industrio, subteno al agrikulturo kaj subteno al vastaj amasoj de maldekstruloj, kaj efektivigo de milita kontrolo, politika kaj milita trejnado", nia armeo elportis novajn hardojn, faris novajn meritojn por la popolo kaj fariĝis ankoraŭ pli potenca. Vastaj amasoj de milicianoj partoprenis en la batalo por defendi la patrolandon kaj en socia klasbatalo, kaj tiamaniere faris kontribuon por firmigi la proletan diktaturon. En gvidantaroj de ĉiuj niveloj efektiviĝis triflanka kombiniĝo de maljunaj, mezaĝaj kaj junaj kadroj, milionoj kaj milionoj da daŭrigantoj de la proleta revolucia afero kreskas hardate en la batalo, laŭ la kvin kriterioj elmetitaj de Prezidanto Maŭ. La eduka revolucio, literatura kaj arta revolucio, higiena revolucio kaj socialisma revolucio sur la scienca-teknika fronto antaŭenmarŝas per grandaj paŝoj en la akra batalo inter la du linioj. Vastaj amasoj de intelektaj gejunuloj aktive kaj konkure iras al montregionoj kaj kamparo por tie labori, diversnivelaj kadroj persiste iras la majsepan vojon. Vigle disvolviĝas la amasa movado lerni de Daĝaj en agrikulturo kaj lerni de Daking en industrio. Flore prosperiĝas tago post tago la industria kaj agrikultura produktado kaj la tuta nacia ekonomio. Tra la granda patrolando ĉarme ridas buntaj floroj kaj ĉie prezentiĝas prosperaj scenoj. La Granda Proleta Kultura Revolucio pluapaŝe liberigis la forton de centmilionaj popolanoj, la grandega forto elvolvita de ĝi, kiu ĵus komencas sin montri, ankoraŭ pli plene manifestiĝos kun la profundiĝo de la revolucio.

Ni devas antaŭenmarŝi en venko kaj disvolvi la bonegan situacion. Vastaj amasoj de partianoj, kadroj kaj popolanoj devas serioze studi serion da gravaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ pri la granda kultura revolucio kaj pri batalo kontraŭ la dekstra deviaciisma vento celanta renversi la ĝustajn verdiktojn, studi teorion pri daŭrigo de la revolucio sub la proleta diktaturo, klare kompreni la problemon kie estas la burĝaro kaj kiel praktiki ĉiuflankan diktaturon super la burĝaro, persiste oponi kaj preventi reviziismon kaj daŭrigi revolu-

cion. Estas necese profunde koni la brilajn venkojn kaj grandan signifon de la granda kultura revolucio, entuziasme subteni novajn socialismajn aferojn, firmigi kaj disvolvi la venkajn fruktojn de la granda kultura revolucio. Estas necese pluapaŝe profunde kritiki Deng Hiaŭping, batali kontraŭ la dekstra deviaciisma vento celanta renversi la ĝustajn verdiktojn kaj rezolute bati kontraŭrevoluciajn subfosajn agojn. Estas necese, sub la ĝenerala celo kritiki Deng Hiaŭping, unuigi pli ol 95% de la kadroj kaj popolanoj, plue bone konduki revolucion de la superstrukturo kaj tiun de la ekonomia bazo. Estas necese **teni revolucion, stimuli produktadon, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito** kaj puŝi konstante antaŭen diversajn aferojn de la socialisma konstruado.

La proletaro estas plena de revolucia optimismo. Ni kredas je dialektiko. Ni firme kredas: **"La anstataŭo de la malnova per la nova estas ĝenerala kaj neniam kontraŭstarebla leĝo de la universo."** (*Pri Kontraŭdiro*) Kiel ajn zigzaga estu la vojo de revolucio kaj kiom ajn da ripetiĝoj okazu, la vero de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso estas nerezistebla, kaj la popolamasoj konsistigantaj pli ol 95% de la totala loĝantaro ĉiam volas revolucion. Revolucio neeviteble venkas reakcion, la nova neeviteble venkas la putran, tio estas historia leĝo. Estas jam disrompita la malnova mondo en la pasintaj pli ol cent jaroj depost la naskiĝo de Marksismo. Hodiaŭ, kapitalismo kaj reviziismo ankoraŭ pli kolapsis kaj degeneris kiel "subiranta suno en la okcidenta vento". Ĉiuj pajacoj saltantaj kontraŭ la historia fluo eble gajnos portempe, sed fine estos balaitaj de la popolo en la historian rubejon. Kiel Marks kaj Engels siatempe asertis: **"Pereo de la burĝaro kaj venko de la proletaro same estas neeviteblaj."** (*Manifesto de la Komunista Partio*) En la tempo de rememoro al la deka datreveno de la "Cirkulero", retrorigardante la batalan procezon de la granda kultura revolucio, malfermante la okulojn al la bonega situacio ke orioloj kantas kaj hirundoj dancas, ĵetante la rigardon al la brila perspektivo de renversiĝo de la ĉielo kaj tero, ni, plenplenaj de revolucia patoso, decidas sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ persiste preni la klasbatalon kiel ĉefĉeneron kaj ĝisfine daŭrigi la revolucion sub la proleta diktaturo.

Ĉiam venkas la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj neniam haltigeblas niaj paŝoj en la antaŭenmarŝado!

Ĉiam brilu la Granda Proleta Kultura Revolucio!

---

1. *La "Februara Raporta Skizo" estas la "Raporta Skizo de la Kvinpersona Grupo de la Kultura Revolucio pri la Kuranta Akademia Diskuto", kiun la kontraŭrevolucia reviziisto Peng Ĉen sankciis kaj distribuis al la tuta Partio je la 12-a de februaro de 1966 per ekstreme malhonestaj rimedoj, en arbitra ago, trouzante sian povon kaj uzurpante la nomon de la Centra Komitato de la Partio. La Raporta Skizo oponas kontraŭ konduko de la socialisma revolucio ĝis la fino, oponas kontraŭ la linio de la Centra Komitato estrata de kamarado Maŭ Zedong pri kultura revolucio, atakas proletajn maldekstrulojn, protektas burĝajn dekstrulojn kaj servas por prepari publikajn opiniojn por burĝaro en kapitalisma restaŭro. La skizo estas speguliĝo de burĝa ideologio en la Partio kaj estas centoprocente reviziisma.*

# En la Unua de Majo

Festa prezentado en parko




5·1





*(Maldekstre)* Ĥoro de diversaj naciecanoj


*(Sube maldekstre)* Laboristoj-milicianoj kaj aliaj, kiuj glore faris meritojn en la batalo por frakasi la kontraŭrevolucian politikan incidenton sur Tian-anmen-placo, gaje renkontiĝas en parko kaj interbabilas pri la venko.

*(Malsurpre)* En festa parko









*(Supre maldekstre)* Komunumanoj de antaŭurboj de Pekino rigardas artan prezentadon en parko.

Infanoj en prezentado



Tian-anmen-placo en la festa nokto



Laboristino-milicianino Jang Min-gju kaj knabinoj en parko

EL POPOLA ĈINIO
中国报道

N-ro 7
(216)
1976

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILOJ:

paĝo 1: En la Unua de Majo

paĝo 2: Tian-anmen-placo en la festa nokto

paĝo 3: Neelĉerpebla fonto (gravuraĵo)

paĝo 4: Skulptaĵoj el Ŝoŭŝan-ŝtono de Fugian-provinco

BILDPAĜOJ:

1. En la Unua de Majo
2. Nova fizionomio de la Ŝanhaja Kvina Ŝtala Fabriko
3. Kolora rakontfilmo «Ĉunmiaŭ»



## Enhavo

Naĝado (Poemo de Maŭ Zedong) . . . . . . . . 2

En ondegojn por sin hardi . . . . . . . . . . 4

La Unua de Majo celebrita en triumfo . . . . . . 8

Kiel Ŝaŝi disvolvis sian industrion . . . . . . . . 12

Ŝanĝiĝo de la Ŝanhaja Kvina Ŝtala Fabriko . . . . 24

Amasa debato en la sciencaj kaj teknikaj rondoj . . . 29

Por ekstermi talpogrilojn . . . . . . . . . . . . 35

Kiel popola leterportisto . . . . . . . . . . . 37

Printempaj plantidoj . . . . . . . . . . . . . 40

METIARTAĴOJ: "La Longa Marŝo" (skulptaĵoj) . . 44

AMIKECO: Tajlanda ensemblo en Ĉinio . . . . . 45

Junaj muzikistoj de Japanio vizitis Ĉinion 46

Ĉinaj Naciecoj: La ĉjang-oj . . . . . . . . . . 48

HISTORIAJ RAKONTOJ: Sang Hongjang refutis konfucianojn . . . . . . . . . . . . . . . 50

KURANTAJ AFEROJ . . . . . . . . . . . . . 52

ESPERANTA ANGULO: Bonvenon al geamikoj el UEA . . . . . . . . . . . . . . . 55


# MAŬ ZEDONG:

# NAĜADO

—Laŭ la melodio de *Ŝuj Diaŭ Ge Toŭ*
Junio de 1956

*Tuj post la trinko de l' Ĉangŝa-a akvo*
*Mi manĝis ankaŭ la Vuĉang-an fiŝon.*
*Jangzi-riveron dekmil-lian mi transnaĝas,*
*Ĝis horizonto volbas la ĉiel' de Ĉu-o.*
*Malgraŭ la ventoblov' kaj ondobato,*
*Al mi agrablas pli ol promenad' en korto,*
*Hodiaŭ havas mi plezuron de malstreĉo.*
*"La majstro foje diris ĉe rivero:*
*'Kiel ĉi fluo ja forpasas ĉio!'"*


*Moviĝas veloj kaj trankvilas*
*Testudo- kaj Serpento-montoj,*
*Grandegaj planoj realiĝas.*
*Pontego fluge spanos inter sud' kaj nordo*
*Kaj turnos la fosegon en ŝoseon.*
*En la fluejo supra staros ŝtonmurego*
*Por bari l' nubojn kaj la pluvojn de Vuŝan-o.*
*Aperos glata lag' en la kanjono.*
*Se la diin' ankoraŭ restas sana,*
*Ŝi miros pro la ŝanĝo de la mondo.*



Prezidanto Maŭ post naĝado trans Jangzi-rivero

JAN NAJHUA:

# EN ONDEGOJN POR



*Laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de Pekino en naĝado*

JE la 16-a de julio antaŭ 10 jaroj, kiam vigle iris la Granda Proleta Kultura Revolucio, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ refoje faris plezuran naĝadon en Jangzi-rivero. Li multfoje alvokis al la popolo sin hardi en riveroj kaj maroj dirante: **"Naĝi en riveroj kontraŭ fluoj povas hardi homan volon kaj kreskigi kuraĝon."**

Prezidanto Maŭ ĉiam kuraĝigas la popolon disvolvi naĝadon kaj aliajn sportojn, plurfoje naĝis en Jangzi-rivero, Hianggiang-rivero en Hunan, Jonggiang-rivero en Guanghi, la Dektri-Maŭzolea Akvokonservejo ktp., kaj precipe la naĝado en Jangzi-rivero fare de li je la dirita dato en la granda aĝo de 72 jaroj forte kuraĝigis la vastajn amasojn en akra batalo kontraŭ la burĝa stabo de Liu Ŝaŭki tiel, ke ili firme decidis antaŭen puŝiĝi sub la gvido de Prezidanto Maŭ kontraŭ la ondegoj de klasbatalo. Kaj samtempe vigle disvolviĝis amasaj naĝaj aktivadoj en nia lando, kaj pli kaj pli multe da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, gejunuloj kaj geknaboj partoprenis en tiaj aktivadoj. Je la 16-a de julio en la pasintaj 10 jaroj, amasa naĝado en riveroj, lagoj kaj maroj, estis aranĝita en ĉiuj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj kaj la partoprenintoj ofte atingis la nombron de kelkaj milionoj.

Ĉinio estas lando kun multaj akvoj. Ĝia marbordo longas je pli ol 14,000 kilometroj, en ĝi fluas multaj riveroj inkluzive de la famaj Jang-

# SIN HARDI


zi-rivero, Flava Rivero, Perlo-rivero kaj Kiantang-rivero, kaj dissemiĝas multaj lagoj. Ne nur en la akvoriĉa suda Ĉinio troviĝas multaj naturaj naĝejoj, sed ankaŭ en norda Ĉinio kaj aliaj sekaj regionoj konstruiĝis pli kaj pli multaj naĝejoj kaj naĝbasejoj sekve de rapida disvolviĝo de akvoutiliga konstruado post la Liberiĝo, kiuj havigis al la amasoj pli bonajn kondiĉojn por disvolvi naĝajn aktivadojn.

En Linhian-gubernio de Henan-provinco en centra Ĉinio, kie ofte okazis sekegeco kaj eĉ mankis akvo por trinki en la pasinteco, la popolo fendis montojn kaj konstruis la irigacian kanalon Ruĝa Flago en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Tiu kanalo kun multaj branĉoj kaj akvokonservejoj alkondukas akvon de rivero, ne nur solvis la problemon de sekeco en disvolvo de agrikultura produktado, sed ankaŭ havigis al la gubernio lokojn por naĝado en somero. En 1974 plurajn monatojn ne pluvis, sed je la 16-a de julio la popolo de Linhian-gubernio okazigis naĝan konkurson, kiu estis ankaŭ manifestacio kaj defio al la naturo. En aliaj lokoj, precipe en la akvoriĉa suda Ĉinio, eĉ pli ĝeneraliĝis naĝaj aktivadoj. Foje en Dongguan-gubernio de Guangdong-provinco, 190,000 personoj partoprenis en naĝado trans riveroj. 70 pocentoj de la membroj de Daŭgiaŭ-komunumo de tiu gubernio scipovas naĝi. Antaŭ la Liberiĝo, en Dongguan troviĝis nur unu naĝbaseno, kiu ekskluzive servis al bienuloj kaj kapitalistoj por amuzo, kaj la laborantaj popolanoj ekspluatataj kaj vivantaj en mizero tute ne havis libertempon por naĝado. Post la Liberiĝo, la laboranta popolo fariĝis mastro de la ŝtato. Sekve de la impeta disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado, ilia vivo pliboniĝas kun ĉiu tago kaj naĝado fariĝis sporto por la vastaj amasoj. Nun la popolo de Dongguan-gubernio jam havas 15 naĝbasenojn. La komunumoj kaj brigadoj ankaŭ konstruis grandan nombron da simplaj naĝejoj ĉe riveroj, akvokonservejoj kaj surmontaj lagetoj, kaj surbaze de ĝeneraligo de naĝaj aktivadoj de la amasoj oni fondis 8 amatorajn naĝartajn lernejojn kiuj ne nur akcelis altiĝon de la naĝarto de la amasoj sed ankaŭ kulturis konsiderindan nombron da eminentaj naĝistoj por la ŝtato. El la 29 naĝistoj de nia lando, kiuj partoprenis en la Sepa Azia Sportkonkurso, 6 devenis de la kamparo de Dongguan. Kaj el tiuj 6 sportistoj 2 estis komunumanoj kaj la ceteraj estis mezlernejanoj.

La gejunuloj kaj geknaboj estas la estonto kaj espero de la lando. Ilia sano estas multe zorgata de la Partio kaj la edukaj institucioj. Tiel en kamparo kiel en urboj, la lernejoj organizas la lernantojn por disvolvi diversajn sportajn aktivadojn kaj en iuj lokoj, kie estas necesaj kondiĉoj, naĝado estas instruata kiel unu el la sportaj lecionoj. La 17-a Mezlernejo de Ljuda en nordorienta Ĉinio ofte naĝigas la lernantojn en maro. La lernantoj estas dividitaj en grupoj, kaj ĉiu grupo havas sekurigistojn. El la pli ol 1,300 lernantoj pli ol 1,000 scipovas naĝi. 7-jara knabo Huang Hin de infanĝardeno de la urbo Vuhan triafoje partoprenis en la amasa transnaĝado de Jangzi-rivero en la pasinta jaro. Inter la partoprenantoj de la amasa transnaĝado de Perlo-rivero en Kantono je la 16-a de julio, 1974, estis kvadrata formacio el pli ol 20 infanoj en aĝo de 4 ĝis 7 jaroj. Ĉiuj tiuj infanoj sukcese plenumis la naĝadon de 4,300 metroj en tiu tago.

En la pasintaj dekkelkaj jaroj, en Guanghi, Ĝegiang, Henan, Ŝanhajo, Pekino kaj aliaj lokoj, pli kaj pli multiĝis naĝemuloj en somero, kaj ankaŭ aperis multaj homoj kiuj ŝatis naĝi en vintro. La lastaj prenas vintran naĝadon kiel bonan sporton por hardi siajn korpon kaj volon.

Partoprenante en naĝaj aktivadoj, la vastaj amasoj pli kaj pli klare vidis la signifon de tiu sporto por hardado de homaj korpo kaj volo kaj por la konstruado kaj defendado de la patrolando, kaj sekve ili pli konscie partoprenas en tiuj aktivadoj. Juna laboristino de la Brika kaj



*Amasa naĝado en la Guanghi-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono*

Tegola Fabriko de Hjuanĉeng de Hubej-provinco estis malsanema en la pasinteco kaj ne povis bone plenumi sian produktan laboron. Dank' al partopreno en naĝado, ŝi multe plifortiĝis, kaj fariĝis avangarda laboristino en la gubernio pro bonega plenumo de sia produkta tasko. Pli ol 160 el la 250 oficistoj kaj laboristoj de tiu fabriko jam ellernis naĝarton. Multe reduktiĝis la nombro de laboristoj kiuj ne povis labori pro malsano, kaj prosperiĝis la revolucio kaj produktado de la fabriko.

Naĝado ofte konsistigas parton de la trejnado de milicianoj, kio ne nur havigas al milicianoj militan arton, sed ankaŭ plifortigas ilian korpon kaj kulturas kuraĝon kaj obstinan spiriton por batali kontraŭ invadantoj. Tianmu-brigado de la norda antaŭurbo de Tiangin, en disvolvo de amasaj naĝaj aktivadoj, aranĝis armitan naĝadon, perfortan transnaĝadon kaj surakvan pafadon por milicianoj. En ekzerco de perforta transnaĝado, la milicianoj ĉiuj bone plenumis sian taskon, venkinte la malhelpon de la "malamikoj", dank' al sia lerta naĝado, fleksebla taktiko kaj obstina batalspirito, kiujn ili havigis al si en la ekzercado.

La partopreno de kamparaninoj en naĝado estas efektive batalo kontraŭ malbona moro. Pro kateno de konfucianismo en la pasinteco, ĉinaj kamparaninoj tute ne havis ŝancon por partopreni en sportoj, kaj virinoj estis mokataj pro naĝado. En la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, vastaj amasoj de virinoj kritikis la reakcian doktrinon de Konfucio ke "la viroj estas noblaj, dum la virinoj malnoblaj" ktp, forĵetis la malnovajn tradiciajn konceptojn kaj partoprenis en naĝado same kiel viroj. En Ĉangtaj-gubernio de Fugian-provinco troviĝas virina milicia plotono. Kiam la milicianinoj komencis lerni naĝadon, homoj kun malnova tradicia koncepto diris skuante la kapon: "Kia honto, ke knabinoj nudigis siajn brakojn kaj gambojn!" Sed la mokoj ne povis ŝanceli ilian decidon. Nun ne nur la milicianinoj jam ellernis naĝarton, sed ankaŭ aliaj virinoj de la brigado partoprenis en naĝado sub ilia influo. Kuraĝigate de la ekzemplo donita de la vicsekretariino de la partia filio Ĝoŭ Keĝoŭ, ĉiuj virinoj en aĝo de malpli ol 40 jaroj de la brigado Hiaŭginĝuang de Baŭdi-gubernio de Tiangin ellernis naĝadon kaj nemalmultaj el ili eĉ povas transnaĝi riveron kun levita hojo aŭ fosilo. Sun


Ĵonghiang, kiu estas patrino de 3 infanoj, ĝoje verkis poemon post ellerno de naĝado:

*Virinoj nun lernas naĝarton rivere,*
*Novigas l' epokon kaj la tradicion.*
*Tretante la feŭdajn katenojn indigne,*
*Ni forte kritikas Lin Biaŭ, Konfucion.*


En la batalo por krei hektaran produktokvanton de 7.5 tunoj da greno, la virinoj de Hiaŭginĝuang plene ludis sian rolon de duono de la kreanta homaro.

Dank' al vasta disvolvo de amasaj naĝaj aktivadoj, ne nur la marbordaj provincoj kaj grandaj urboj sed ankaŭ la landlimaj regionoj kaj internaj provincoj sendis sportistojn al la tutlandaj naĝaj konkursoj en la lastaj jaroj. En la pasinteco, tre malmultaj loĝantoj en Junnan-provinco de la sudokcidenta Junnan-Gujĝoŭ-a Altebenaĵo naĝis en grandaj riveroj. Sed post la disvolvo de amasaj naĝaj aktivadoj, senĉese aperis eminentaj naĝistoj de tiu loko. En la Tria Tutlanda Sporta Konkurso en 1975, la naĝistinoj de Junnan gajnis la ĉampionecon de la grupo A de virina teama konkurso. Hejlonggiang situas ĉe la norda ekstremo de nia lando. Tre mallonga estas ĝia periodo por naĝado en ĉiu jaro pro la frosta klimato. Sed dank' al aktiva disvolvo de amasaj naĝaj aktivadoj, rapide altiĝis la nivelo de la naĝarto de ĝiaj sportistoj. En la Tria Tutlanda Sporta Konkurso, ĝiaj naĝistinoj gajnis la ĉampionecon de la grupo B de virina teama konkurso. La 14-jara Ĝaŭ Ging de tiu teamo rompis, en 1975, la tutlandajn rekordojn de 200-metra, 400-metra kaj 800-metra virinaj miksnaĝoj.

En la pasintaj 10 jaroj, relative rapide altiĝis la nivelo de nia naĝarto. Novaj rekordoj de 29 el la 30 disciplinoj estas kreitaj post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio. Pluraj individuaj rekordoj multe superis la malnovajn. La rekordo de 57.9 sekundoj de 100-metra vira papilinaĝo kreita de Luo Ĝaŭjing, sportisto de Guangdong-provinco, proksimiĝis al la monda rekordo.



*Lernantoj de la Lernejo por Gefiloj de Laboristoj kaj Oficistoj de la Giugiang-a Kotona Tekstila Fabriko ludas en naĝbaseno.*



*Celebra aktivado en la Kultura Palaco de Laboruloj en Pekino*

GAŬ HINHUA:

# La Unua de Majo

EN la Unua de Majo — la internacia festo de laboruloj, nia ĉefurbo Pekino plenis je ĝojo de solidareco kaj triumfo. La laboristoj kaj aliaj laboruloj de la urbo faris solenajn celebrajn aktivadojn en parkoj kaj siaj institucioj kun granda ĝojo okaze de tiu komuna festo de la tutmondaj laboruloj. En tiu tago, ankaŭ en la aliaj lokoj de nia lando okazis varmaj celebraj aktivadoj.

La Unua de Majo de tiu ĉi jaro estis ĝoje celebrita de la ĉina popolo en la bonega situacio, kiam ĝi gajnis grandajn venkojn en frakaso de la kontraŭrevolucia politika incidento sur Tiananmen-placo, profunda kritiko de Deng Hiaŭping, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj rifuzanta pentofaron kaj rebato al la vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn.

Hua Guofeng, la unua vicprezidanto de CK de KPĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kaj aliaj gvidantoj de niaj Partio kaj ŝtato partoprenis kune kun popolamasoj en ĝojaj celebraj aktivadoj. Kiam la partiaj kaj ŝtataj gvidantoj venis inter la amasojn, la lastaj longe kaj varme manklakadis.

Ankaŭ ĉefministro de Novzelando s-ro Robert Muldoon kaj lia edzino kaj aliaj honorindaj novzelandaj gastoj, kiuj estis farantaj vizitadon al Ĉinio, partoprenis en festa aktivado de la pekina popolo kaj estis varme bonvenigataj.

La celebraj aktivadoj de la Unua de Majo ĉijare en Pekino estis aparte grandiozaj kaj enhavoriĉaj. La tuta urbo ekbolis tuj post la elkrepuskiĝo. Tiel sur la stratoj grandaj kaj malgrandaj en la urbo kiel sur la ŝoseoj en la antaŭur-



*Laboristoj kaj milicianoj de la ĉefurbo spektas artan prezentadon en la festotago.*

# celebrita en triumfo

boj, viroj kaj virinoj, gejunuloj kaj gemaljunuloj, ĝoje rapidis arope al la ses grandaj parkoj kaj aliaj kunvenejoj por celebra aktivado. Kun triumfa sento, la laboristoj-milicianoj, popolaj policanoj kaj gardaj soldatoj de nia ĉefurbo, kiuj faris glorajn meritojn por la Partio kaj la popolo en frakasado de la kontraŭrevolucia incidento sur Tian-anmen-placo, partoprenis en celebra aktivado. Ĉie, kien ili alvenis, ektondris aplaŭdoj. En la tuta urbo, pli ol miliono da popolanoj partoprenis en celebraj aktivadoj.

En la grandaj parkoj de Pekino, sennombraj ruĝaj flagoj, slogano-tabuloj, bukedoj kaj koloraj rubandoj aldonis pli multe da viveco kaj belo al la pejzaĝo. Per diversformaj literaturaj kaj artaj verkoj oni propagandis la instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri rebato al la vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn kaj la gravan signifon de la du rezolucioj de la Centra Komitato de KPĈ, ĝoje festis la grandajn venkojn akiritajn en la profunda kritiko kontraŭ Deng Hiaŭping kaj rebato al la vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn. 500 profesiaj kaj amatoraj literaturaj kaj artaj trupoj prezentis grandan nombron da programeroj, kiuj entuziasme prikantas la Grandan Proletan Kulturan Revolucion, la edukan revolucion, la literaturan kaj artan revolucion kaj la higienan revolucion kaj aliajn novajn socialismajn aferojn kaj spegulas la bonegan situacion de vigla disvolviĝo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de Ĉinio sur ĉiuj frontoj, sub la antaŭenpuŝado de la kultura revolucio kaj la iranta granda batalo. Laboristoj-milicianoj de la Pekina Dentrada Fabriko, Pekina Poŝtoficejo k.a. prezentis



*Popolanoj de nacimalplimultoj en celebrado de la Unua de Majo en parko*

kantojn kaj dancojn kaj deklamis poemojn, kiujn ili mem verkis laŭ siaj propraj spertaĵoj en revolucia batalo, kaj montris per ili la revolucian spiriton de la heroaj laboristoj-milicianoj de nia ĉefurbo, kiuj estas fidelaj al la Partio kaj la popolo kaj brave batalas por firmigi la diktaturon de la proletaro. Ilia prezentado kun batala etoso de tempo al tempo rikoltis varmajn aplaŭdojn de la spektantoj. Studentoj devenintaj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj instruistoj kaj oficistoj de Kinghua-universitato kaj la Pekina Universitato, kiuj batalas en la unuaj vicoj kontraŭ la vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn, kune prezentis batalajn kantojn kaj dancojn. La ampleksa kantodanco "Renversi la Ĝustajn Verdiktojn Estas kontraŭ la Volo de la Popolo" vivece prezentas la heroan bataladon de la membroj de la laborista propaganda taĉmento, la instruistoj, studentoj kaj oficistoj de la universitatoj kontraŭ la reviziisma linio de Deng Hiaŭping. Membroj de la Popola Komunumo de Ĉina-Korea Amikeco en antaŭurbo de Pekino prezentis *Kuajban*-on (rakontan versaĵon dediĉitan por deklamado kun klakilo) kolektive verkitan de ili, kiu vivece spegulas la gigantajn ŝanĝojn de tiu popola komunumo en la kultura revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. La sportistoj faris prezentadon en parkoj, sportejoj kaj bazaj unuoj por la amasoj kaj tio pliintensigis la festan atmosferon de nia ĉefurbo.

En la festotago de Pekino, aliaj ĝojigaj scenoj vidiĝis en la fabrikoj kaj minejoj kaj sur kampoj, kie daŭre iris produktado. Multaj kadroj iris sur la produktan fronton kaj batalis kune kun laboristoj ĉe afinaciaj fornegoj, en karbominejaj ŝaktoj aŭ sur fervojoj kaj atingis multajn sukcesojn per sia penema laborado. La komunumanoj en la antaŭurboj de Pekino ĝustatempe semis malgraŭ sekeco kaj irigaciis kaj sterkis tritikajn kampojn por gajni riĉan rikolton en tiu ĉi jaro. La laboristoj kaj kamparanoj esprimis, ke ili nepre penetrive kritikos la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Deng Hiaŭping, persiste gvidos la produktadon per revolucio kaj klopodos por gajni, sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ankoraŭ pli grandajn venkojn en la socialisma konstruado.

Reprezentantoj de niaj samlandanoj en Tajvan, Hongkongo kaj Aŭmen kaj patriotaj ĉinaj elmigrintoj partoprenis en la festa celebrado en Pekino kaj ili estis varme bonvenigataj de la amasoj.

La komandantoj kaj soldatoj de la garnizona trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la milicianoj de nia ĉefurbo kuraĝigis unuj aliajn en la celebraj aktivadoj kaj esprimis, ke ili multobligos sian revolucian gardemon, pliintensigos la preparadon kontraŭ milito por esti ĉiam pretaj por ekstermi invadantajn malamikojn kaj defendi la socialisman patrolandon kaj nepre liberigos la sanktan teritorion de la patrolando Tajvan-provincon.

Pli ol 6,000 fremdlandaj gastoj el la kvin kontinentoj ĝoje pasigis la festotagon kune kun la popolo de Pekino. Ni kore deziras, ke senĉese firmiĝos kaj disvolviĝos la amikeco kaj unuiĝo inter la ĉina popolo kaj la aliaj popoloj de la mondo kaj varme aklamas la grandan unuiĝon de la tutmonda popolo.

En la festa nokto, Pekino estis hele iluminita kaj brilaj fajrajoj jen kaj jen flugis en la aeron beligante la ĉielon per buntaj koloroj. Sur la brila Tian-anmen-placo kaj aliaj celebraj punktoj, miloj kaj miloj da triumfaj revoluciaj popolanoj kolektiĝis kaj sin amuzis per dancoj kaj kantoj. Iliaj ĝojkrioj "Vivu Prezidanto Maŭ" sonis potence kiel printempaj tondroj kun eĥoj de la koroj.

La celebraj aktivadoj de Pekino kaj la aliaj lokoj de nia tuta lando spegulis, ke la koro de nia tuta popolo direktiĝas al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj al la granda Komunista Partio de Ĉinio. Kun plena memfido pri venko, la diversnaciecaj popoloj de Ĉinio decidis unuiĝi sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ por gajni ankoraŭ pli grandajn venkojn.

*Danco ludata de Kinghua-universitato*



# Kiel Ŝaŝi disvolvis sian industrion

*Ŝaŝi estas negranda urbo kun 150,000 loĝantoj, kiu antaŭe estis neatentita. Pro relative rapida starigo de sia industrio, ĝi fariĝis avangarda urbo de Hubej-provinco en lernado de Daking. Antaŭ nelonge raportisto de nia gazeto vizitis tiun belan urbon ĉe Jangzi-rivero kaj interparolis kun respondeculo de la partia komitato, industriaj kadroj kaj laboristoj de la urbo pri la disvolviĝado de la industrio de la urbo.*

*Antaŭ 2,600 jaroj, kiam Ĉinio transiris de sklava sistemo al feŭda sistemo, Ŝaŝi jam fariĝis haveno de la ĉefurbo de iu regno. En la pasintaj pli ol 2,000 jaroj, ĝi floris kaj ŝrumpis plurfoje. Post kiam imperiismaj fortoj invadis Ĉinion, Ŝaŝi fariĝis unu el la ĉinaj komercaj havenoj malfermitaj al fremdaj landoj. Pro la putra regado de King-dinastio kaj la reakciuloj de Kuomintango kaj la prirabado de imperiistoj, Ŝaŝi kadukiĝis kaj malriĉiĝis. Post la Liberiĝo, gvidate de la Komunista Partio de Ĉinio la popolo de Ŝaŝi likvidis la privatan posedon de produktaj rimedoj kaj starigis la komunan posedsistemon. Surbaze de tio, la industrio disvolviĝis paŝon post paŝo. Precipe post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la popolo de la urbo serioze plenumas la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ, persistas en la principo de sendependeco kaj memdecido kaj sinapogo sur propraj fortoj, disvolvas la movadon lerni de Daking en industrio, iras sian propran vojon en disvolvo de industrio kaj rapide ŝanĝis la fizionomion de sia urbo.*

*Ĉisube estas protokolo de la interparolo.*

*— La Redakcio*



*Ĝang Gian*



*Li Guanggen*

**Partoprenantoj:**

**Ĝang Gian:** La dua sekretario de la Ŝaŝi-a Komitato de KPĈ

**Li Guangĝen (virino):** Vicsekretario de la Ŝaŝi-a Komitato de KPĈ kaj ŝpinistino

**Ĝaŭ Zufu:** Vicestro de la Plana Komisiono de Ŝaŝi

**Ŝen Ĝengjing (virino):** Vicdirektoro de la Tekstila Buroo de Ŝaŝi

**Ĝaŭ Deŝeng:** Laboristo-inĝeniero kaj estro de la revolucia komitato de la Dizela Fabriko de Ŝaŝi

**Ŝen Bingcaj:** Vicestro de la revolucia komitato de la Kaŭĉuka Fabriko de Ŝaŝi

**Li Zujuan:** Vicsekretario de la Kompartia filio de la Kvarcovitra Fabriko de Ŝaŝi

**Lu Sanjing (virino):** Laboristino de la Termosa Fabriko de Ŝaŝi

**Raportisto de nia redakcio**

## ŜANĜIĜOJ

**Raportisto:** Dankojn al vi pro via ĉeesto al tiu ĉi kunsido. Niaj legantoj tre deziras informiĝi pri tio, kiel la nova Ĉinio disvolvas industrion sendepende kaj sinapoge sur propraj fortoj, tial mi invitis vin al la kunsido por interparoli pri la disvolvo de la industrio de via urbo.

**Ĝang Gian:** Verdire, nia klopodo estas multe malpli bona ol tiu de multaj aliaj urboj de nia lando. Nun ni havas pli multajn industriajn entreprenojn ol en la pasinteco, kaj tio estas rezultato de plenumo de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Nia Ŝaŝi situas sur Gianghan-ebenaĵo en la meza baseno de Jangzi-rivero kaj nun ĝi estas nova malpezindustria urbo de Hubej-provinco. La nomita ebenaĵo produktas grenon kaj kotonon kaj havas favorajn kondiĉojn por disvolvi malpezan industrion. Sed antaŭ la Liberiĝo, Ŝaŝi estis nur haveno kie imperiistoj dumpingis varojn kaj forrabadis agrikulturajn produktaĵojn, kaj havis tre malmultajn fabrikojn. Tiam ĝi havis nur malgrandan tekstilan fabrikon, unu kotonpakejon, tri maŝinfabrikojn kaj kelkajn metiejojn. Preskaŭ ĉiuj ĝiaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj industriaj estis importitaj el fremdaj landoj. El ĝiaj 79,000 loĝantoj, nur 1,000 estis industriaj laboristoj.

**Ĝaŭ Zufu:** Pluraj el la ĉeestantoj estis laboristoj tiam multe subpremataj kaj ekspluatataj.

**Li Guangĝen:** Mi kaj kamaradino Ŝen Ĝengjing eklaboris en la tekstila fabriko je la aĝo de 11-12 jaroj. Tiam ĝi estis la plej granda fabriko en Ŝaŝi. El la 8,000 spindeloj tiam funkciis nur malpli ol duono kaj ĉiujare ĝi povis produkti nur 2,000 pakojn da dikaj fadenoj.

**Ĝaŭ Deŝeng:** Kvankam la tri maŝinfabrikoj nomiĝis fabrikoj, tamen fakte ili povis fari nur



*Ĝaŭ Zufu*



*Ŝen Ĝengjing*

riparojn. La fabriko en kiu mi metilernis estis la plej granda, sed ĝi havis nur 21 laboristojn kaj unu manturnatan rimenan tornilon. En ĝi oni forĝis per marteloj kaj povis ripari ĉefe teksilon kaj kotonsensemigilon.

**Ŝen Bingcaj**: Tiam la stratoj de Ŝaŝi estis kavoplenaj kaj ĝiaj lampoj ne helaj. Ĝia 100-kilovata elektrejo povis provizi nur kelkajn fremdlandajn butikojn per elektro por lumigado.

**Ĝang Gian**: Nur tian mizeraĵon la malnova Ĉinio postlasis al ni! Post la Liberiĝo, dank' al penlaborado de la laboristaro de Ŝaŝi en la pasintaj 26 jaroj, precipe en la Granda Proleta Kultura Revolucio, ni turnis la konsuman urbon Ŝaŝi en novan socialisman produktan urbon, disvolvante industrion laŭ la principoj elmetitaj de Prezidanto Maŭ **"konstrui nian landon sendepende, nin apogante sur propraj fortoj kaj pene luktante kontraŭ malfaciloj kun diligenteco kaj ŝparemo"**. La totala industria produktovaloro de Ŝaŝi en 1975 estis 47.7-oblo de tiu de 1949 kaj 4.3-oblo de tiu de 1965 antaŭ la kultura revolucio, nome multe superis la totalan industrian produktovaloron de la tuta Hubej-provinco en 1949. Nun ni jam fondis industriojn de tekstilaĵo, kemiaĵo, maŝino, elektroniko, konstrua materialo ktp. Multiĝas de jaro al jaro la specoj de la industriaj produktaĵoj kaj altiĝas ilia kvalito. Nun ni povas produkti 120-ĉevalpovan dizelon, altrapidecan frotummaŝinon, bormaŝinon, kemian sterkon, insekticidojn, naftosenakvigilon, kvarcovitron, poliesterajn miksteksaĵojn, kordurojon, veluron, maŝinfabrikitan paperon k. a., el kiuj multaj jam atingis la enlandan avangardan nivelon kaj ĉ. 50 specoj de la produktaĵoj estas eksportataj.

**Ŝen Ĝengjing**: La supre menciita ŝpinejo, nun nomata Hiangjang-tekstilejo, havas 50,000 spindelojn kaj ĝiaj malnovaj importitaj maŝinoj estas anstataŭitaj de novaj maŝinoj produktitaj de nia lando mem. Nun ĝi estas plivastigata kaj 24,000 spindeloj estos aldonitaj.

**Ĝaŭ Zufu**: Ĉe Pekin-strato troviĝas magazeno, kie oni eksponas kaj vendas varojn produktitajn de Ŝaŝi, kaj alilokaj vizitantoj ŝatas ĝin viziti por pririgardo kaj aĉeto.

**Li Guangĝen**: Tie vendiĝas nur ĉiutagaj bezonaĵoj produktitaj de Ŝaŝi.

**Raportisto**: Oni diris, ke antaŭe Ŝaŝi eĉ ne povis produkti mantukon, sed nun ĝi jam povas produkti tiel multe da industriaj varoj. Bonvolu diri al mi, kiel okazis tiu ŝanĝo?

## RADIKALA ŜANĜO

**Ĝang Gian**: Ŝaŝi estis liberigita en julio de 1949. En la tago de ĝia liberiĝo, mi venis ĉi tien kune kun la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Tiam en Ŝaŝi estis multaj lokaj bankoj, fremdlandaj butikoj, tetrinkejoj kaj restoracioj, sed bankrotis fabrikoj kaj granda nombro da laboristoj falis en senlaborecon. La novnaskita popola regpotenco unue ŝtatigis la imperiistajn kaj burokratokapitalistajn entreprenojn, kaj poste paŝon post



*Ĝaŭ Deŝeng*



*Ŝen Bingcaj*

paŝo faris socialisman transformadon al la kapitalismaj industriaj kaj komercaj entreprenoj kaj individuaj metiaj entreprenoj. Samtempe ni aktive restarigis kaj disvolvis la produktadon laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ **"Ekde la unua tago kiam ni transprenas la administradon de iu urbo, ni devas direkti niajn okulojn al la restarigo kaj disvolvado de la produktado de tiu ĉi urbo."**

**Ĝaŭ Zufu**: Tio signifas, ke post kapto de la regpotenco ni starigis socialisman produktan rilaton surbaze de la komuna posedsistemo. Tiu ŝanĝo estas tre grava kaj ĝi malfermis larĝan vojon por disvolvi nian industrion kaj konstrui socialismajn novtipajn urbojn.

**Ĝaŭ Deŝeng:** Tiam altiĝis la aktiveco de ni laboristoj. Ni ne estis plu sklavoj de la kapitalistoj sed mastroj de la nova socio. Ĉiuj unuanime volis bone funkciigi la fabrikojn por subteni la konstruadon de la lando. La tri maŝinfabrikoj estis transformitaj en la Ŝtatan-Privatan Limin-maŝinfabrikon. La laboristoj aplikis motoron de aŭto por movi la ilmaŝinojn kaj komencis fabriki simplajn maŝinojn.

**Li Guangĝen:** Ankaŭ ni ŝpinistinoj agis tiel same, ni laboris aparte energie, ĉar ni sciis, ke ni laboras ne por kapitalistoj, sed por la revolucio, por nia propra ŝtato.

**Ĝang Gian**: Tiam kamaradino Li Guangĝen estis elektita kiel la labora modelo de la tuta urbo. Poste ŝi estis elektita kiel glora reprezentanto de la Naŭa kaj Deka Tutlandaj Kongresoj de la Partio. Nun ŝi estas vicsekretario de la partia komitato de nia urbo.


**Ĝaŭ Zufu**: Tiam la popolo de la tuta urbo estis tre aktiva en fondo de fabrikoj kaj senlaboraj laboristoj starigis kelkajn fabrikojn per la mono donita de la ŝtato.

**Ĝang Gian:** Sub la gvido de la Komunista Partio kaj la popola registaro, nia urbo laŭplane starigis dekkelkajn fabrikojn en la periodo de restarigo de la nacia ekonomio kaj solvis la problemon de senlaboreco. Per tio Ŝaŝi faris la unuan paŝon por fariĝi produkta urbo.

La fabrikoj fonditaj en tiu periodo estis tre malgrandaj kun malalta produkta nivelo. La industrio de Ŝaŝi rapide disvolviĝis ĉefe dank' al la Granda Antaŭensalto en 1958 kaj pli multe al la Granda Proleta Kultura Revolucio. En la periodo de la Granda Antaŭensalto, ni plenumis la ĝeneralan linion **"streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie"**, tial ni ne nur firmigis kaj disvolvis la fabrikojn starigitajn en la unua periodo post la Liberiĝo, sed ankaŭ fondis konsiderindan nombron da novaj fabrikoj. En la granda kultura revolucio la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki estis kritikita, la socialisma aktiveco de la laboristoj estis movita pliapaŝe kaj la industria produktado de Ŝaŝi komencis marŝi grandpaŝe.



*Li Zujuan*



*Lu Sanjing*

## POTENCA MOVFORTO

**Ĝaŭ Zufu:** En la dek jaroj depost la komenco de la granda kultura revolucio la industria produkto de nia urbo Ŝaŝi ja faris grandajn paŝojn. En tiu periodo, la totala industria produktovaloro kreskis meznombre en ĉiu jaro je 16 pocentoj kaj en la lastaj kvin jaroj, t. e. en la periodo de la Kvara Kvinjara Plano, je 18 pocentoj. La industria produktovaloro de Ŝaŝi kvarobliĝis en la periodo de 1965 ĝis 1975.

**Ĝang Gian:** Prezidanto Maŭ diris: **"La Granda Proleta Kultura Revolucio estas potenca movforto por disvolvi la sociajn produktajn fortojn en nia lando."** Niaj sukcesoj ja estas atingitaj sub la puŝado de tiu movado. Pri tio ni ĉiuj havas klaran komprenon.

**Ĝaŭ Deŝeng:** Unue mi parolu pri nia dizela fabriko. Antaŭ kelkaj jaroj, la ŝtato asignis al nia fabriko la taskon produkti 120-ĉevalpovan dizelon. Ni interkonsiliĝis kaj venis al la opinio, ke la kondiĉoj de nia fabriko ne sufiĉis por plenumi la taskon, kaj ni devis starigi novan fabrikon por tio. Ni petis, ke la ŝtato investu 11 milionojn da juanoj kaj aldonu laboristojn.

**Ĝaŭ Zufu:** Ni elmetis la peton, sed la laboristoj ne konsentis. Ili diris, ke diversaj branĉoj de la socialisma konstruado de la lando bezonas grandan kapitalon kaj ni povas mem eltrovi rimedojn kaj krei kondiĉojn por disvolvi produktadon.

**Ĝaŭ Deŝeng:** En tiu tempo, la gvidantoj de nia fabriko estis balastitaj de la pasivaj atendemo, dependemo kaj postulemo. Laboristoj kritikis nin per dazibaŭo titolita "Kial tiel longe oni ne povas komenci fabrikadon de 120-ĉevalpova dizelo?" Ili kritikis nin, ke ni ne klopodis por krei kondiĉojn necesajn por la saĝo de la amasoj, sed pasive atendadis kun etenditaj manoj al la ŝtato; ili diris ke ni "deviis de la ĝusta linio" kaj trafe montris, ke tio estas manifestiĝo de la influo de la reviziisma industria linio de Liu Ŝaŭki. Ili faris potencan revolucian kritikon kontraŭ la reviziisma linio kaj helpis nin altigi la konscion pri linia batalo.


**Li Guangĝen:** Dank' al la granda kultura revolucio, la konscio de la laboristoj pri la linia batalo multe altiĝis kaj ili povas fari korekton, se la gvidantoj devias de la ĝusta linio.


**Ĝaŭ Deŝeng:** La kritiko de laboristoj forte skuis nin kaj ankaŭ gvidantoj de la partia komitato de la urbo venis en nian fabrikon por helpi nin altigi nian konon. Ni iris inter la laboristojn por aŭskulti iliajn opiniojn kaj serĉi rimedojn. Laboristoj de modelfarejo montris al ni pli ol 50 pretajn plastajn modelojn de moderna dizelo kaj diris al ni: "Plejparto de la modeloj por muldado de dizelaj maŝinpecoj jam estas pretigitaj. Do gvidu nin en energia fabrikado!" Ili jam ekfaris modelojn, kiam ni estis atendantaj investon. Kaj ili tion faris en eksterdejoraj horoj. Informiĝinte ke komenciĝos la fabrikado de nova

dizelo, ankaŭ laboristoj de aliaj farejoj unu post alia donis konsilojn. Kaj ni komencis la laboron kune kun la laboristoj, venkis la malfacilojn de manko de domo kaj ekipajoj kaj sukcese elfaris tian novan dizelon nur en 40 tagoj. Post duona jaro nia fabriko jam povis produkti 300 tiajn dizelojn uzinte nur 300,000 juanojn de la ŝtato, krom plenumo de la aliaj taskoj.

**Ŝen Bingcaj**: Vere ekzistas problemo de politika linio en funkciigo de entreprenoj. Ni komprenis tion el nia propra sperto. Nia kaŭĉuka fabriko estis fondita en la periodo de la Granda Antaŭensalto. En la komenco ĝi povis produkti nur kaŭĉukajn ŝuojn. Post dekkelkjara klopodado plimultiĝis la specoj de ĝiaj produktajoj kaj la fabriko disvolviĝis. Kaj la ŝtato asignis al nia fabriko la taskon de produktado de pneŭmatikoj de traktoro. Iuj opiniis, ke produktado de tiaj pneŭmatikoj povis krei nur malgrandan produktovaloron kaj alporti malmultan profiton, kaj krome la fabriko ne havas specialajn ekipajojn por tio, tial ili ne volis akcepti tiun taskon. Sed la plejparto de la kadroj kaj laboristoj diris, ke la granda kultura revolucio jam kritikis la reviziismajojn kiel "profiton en komando". Se agrikulturo bezonas pneŭmatikojn, ni devas produkti ilin sen konsidero pri la multeco de profito.

*Dizeloj nove produktitaj*





*La Dua Radioaparata Fabriko de Ŝaŝi pogrande produktas 7-transistorajn radioaparatojn por kvar funkcioj.*

Ili tiel diris kaj ankaŭ tiel faris. Nun nia fabriko jam povas produkti naŭ specojn de pneŭmatikoj.

**Ĝang Gian:** Nur du ekzemploj estas ĉi tie menciitaj, tamen en unu flanko ili spegulas la fakton, ke multe altiĝis la memkonscio de la kadroj kaj amasoj en plenumo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj pligrandiĝis ilia entuziasmo en konstruado de socialismo, dank' al la hardado en la granda kultura revolucio. Nur pro ekzisto de tiaj kadroj kaj amasoj, la revolucio kaj produktado de nia urbo povas vigle disvolviĝi.

## DISVOLVI INDUSTRION POR AGRIKULTURO

**Ĝaŭ Zufu:** La industrio de nia urbo stariĝis de la komenco en servo al agrikulturo. La agrikultura kaj flankokupa produktado de la ĉirkaŭa kamparo povas liveri sufiĉajn materialojn por niaj malpezaj industrioj de tekstilo, papero k.s. kaj aparte rapide disvolviĝis la tekstila industrio.

**Ŝen Ĝengjing:** La tekstila industrio estas la plej granda industria branĉo de Ŝaŝi, kaj ĝia produktovaloro konsistigas duonon de la totala produktovaloro de nia urbo. Nun jam formiĝis relative kompleta sistemo de koton-ŝpinteksado, prestinkturado, trikado, teksado de silkaĵoj, lanŝtofoj kaj kemiaj fibroj, kun 160,000 spindeloj kaj ĉ. 5,000 teksiloj. Niaj produktaĵoj jam povas fundamente plenumi la bezonon de dek milionoj da loĝantoj en la ĉirkaŭaĵo, krom eksporto de parto de ili.

**Li Guangĝen:** La tekstila industrio povas uzi lokajn krudajn materialojn kaj disvendi siajn produktaĵon en la vasta merkato de la kamparo, tial ĝi disvolviĝas rapide.

**Ĝaŭ Zufu:** Post sia disvolviĝo, la tekstila industrio povas akumuli kapitalon por la disvolvo de aliaj industriaj branĉoj. Kaj dank' al tio ni povas relative rapide disvolvi aliajn industriajn branĉojn kun malmulta investo de la ŝtato.

**Ĝang Gian:** Prezidanto Maŭ k·j la Centra Komitato de la Partio antaŭlonge jam ellaboris la ĝeneralan politikon por la disvolvado de nia nacia ekonomio **"preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron".** En la konstruado de industrio ni profunde konis la striktan rilaton inter industrio kaj agrikulturo. La abundeco de agrikulturaj rikoltoj rekte influas la rapidecon de la disvolviĝo de industrio, tial dum disvolvado de nia industrio, ni relative multe atentis pri disvolvado de la industriaj branĉoj bezonataj de agrikulturo. Precipe post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, pli klariĝis nia ideo pri la direkto de subtenado kaj servado de industrio al agrikulturo. Nun la tuta urbo povas produkti kemian sterkon, insekticidojn, agrikulturajn maŝinojn kaj aparatojn k.a., entute pli ol 70 specojn de bezonaĵoj por agrikulturo. Kaj krom plenumo de la bezono en la ĉirkaŭa kamparo, ni ankaŭ povas helpi fratajn provincojn kaj regionojn per niaj produktaĵoj.

**Ĝaŭ Deŝeng:** En la lastaj jaroj, la maŝinfabrikoj de Ŝaŝi liveris bormaŝinojn, tornilojn, frotummaŝinojn k.a. al fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj de la 12 najbaraj gubernioj kaj kulturis konsiderindan nombron da teknikaj laboristoj por ili. Nun la kamparo bezonas pli kaj pli multe da agrikulturaj maŝinoj kaj tio akcelos disvolvon de nia industrio bezonata por subteno de agrikulturo en la estonto.

**Raportisto:** En la supre menciita magazeno mi vidis multajn varojn laŭdire speciale fabrikitajn por la kamparo.

**Lu Sanjing:** Jes. Speco de 5-funta malalta kaj dika termoso eble ne tiel plaĉas al urbanoj, tamen estas tre ŝatata de kamparanoj, ĉar ĝi povas firme stari kaj taŭgas por uzado sur kampo. Speco de ŝuo produktata de la fabriko de kamarado Ŝen por kamparanoj estas projektita post mezurado al pli ol 3,000 piedoj.

**Ŝen Bingcaj:** La partia komitato de la urbo postuladas, ke ĉiuj niaj entreprenoj turnu sian servon al la kamparo. Tio ja estas farenda por ni.

**Ĝaŭ Zufu:** La Tutlanda Kunveno por Lernado de Daĝaj en Agrikulturo okazigita en la pasinta jaro ellaboris grandiozan planon pri energia disvolvo de nia agrikulturo kaj ankaŭ elmetis novan taskon al la industrio. Nia urbo Ŝaŝi havas striktan rilaton kun la kamparo, ni nepre klopodos por bone funkciigi la industrion kaj pli multe kontribuos por efektivigi meĥanizon de agrikulturo.

## LA FORTO DE LA LABORISTOJ


**Ĝaŭ Deŝeng:** En starigo de lokaj fabrikoj, ni unue starigas malgrandajn fabrikojn kaj poste ilin grandigas iom post iom. Ekzemple nia Unua Ilmaŝina Fabriko antaŭe estis malgranda fabriko kun kelkdek laboristoj, kiu povis produkti metalajn ĉiutagajn bezonaĵojn. Post senĉesa reformado, nun ĝi jam havas pli ol 500 laboristojn kaj povas produkti tri specojn de bormaŝino. Nun ĝi prove fabrikas numerale regatan bormaŝinon.

**Ŝen Bingcaj:** Kaj ĝi naskis plurajn fabrikojn, ĉu ne?

**Ĝaŭ Deŝeng:** Ho jes, kvin fabrikoj devenis de ĝi unu post alia. Ni prenu la elektromotoran fabrikon kiel ekzemplon: Ĝiaj ĉefaj teknikaj laborantoj estis elektristoj de la ilmaŝina fabriko, kiuj scipovis ripari elektromotorojn. Ĉar la kamparo bezonas elektromotorojn, la ilmaŝina fabriko fondis laborejon por fabriki elektromotorojn. Kun kreskado de la bezono de tia motoro, la partia komitato de la urbo decidis transformi tiun laborejon en memstaran fabrikon. Amasoj de Ŝaŝi nomas tian metodon "kokino demetas ovon".

**Ĝaŭ Zufu:** Nia lando estas disvolviĝanta socialisma lando kaj havas multajn aferojn faren-


*Larĝ-ekranaj projekciaj lensoj produktitaj de la Fabriko de Optikaj Instrumentoj.*



dajn. En konstruado de malgranda urbo kiel la nia, oni ne povas nur konstrui grandajn fabrikojn per ŝtata investo. La ŝtato ankaŭ postulas, ke ni disvolvu lokan industrion per la forto de la amasoj. Dank' al la laŭplana disvolvo de malgrandaj industriaj entreprenoj per la rimedo starigi novajn fabrikojn surbaze de malnovaj kaj turni unu fabrikon en plurajn, oni povas plenumi urbokonstruadon per siaj propraj fortoj kaj kun relative granda rapideco.

**Li Guangĝen:** Por fondi malgrandan fabrikon oni bezonas malmultan kapitalon, relative simplajn ekipajojn, facile mastreblajn teknikojn kaj mallongan tempon. Oni povas rapide reakiri la investitan kapitalon kaj plivastigi la produktadon per sia akumulajo.

*Bormaŝino fabrikita de Ŝaŝi*



**Ĝaŭ Zufu:** Ĉar ni havis relative malmulte da kapitalo kaj ekipaĵoj, ni renkontis multajn malfacilojn en fondado de fabrikoj kaj ni devis ilin solvi per saĝo de la amasoj. Malfaciloj hardas homojn. En la lastaj jaroj aperis en Ŝaŝi multaj avangardaj unuoj kaj personoj en la movado de lernado de Daking, kaj la kvarcovitra fabriko estas elstara ekzemplo.

**Raportisto:** Kamarado Li Zujuan bonvolu iom paroli.

**Li Zujuan:** Nia fabriko elkreskis el iu ordinara vitrofabriko. Antaŭe tiu fabriko ne havis laborejon por farado de kvarcovitro kaj ne sciis kiel produkti tian vitron. Ni nur aŭdis, ke la ŝtato tre bezonas tian vitron. Tiam la gvidanto de la fabriko elektis 7 personojn por provo.

**Ĝang Gian:** La industria branĉo de kvarcovitro de nia lando estas nove starigita. Antaŭe ni devis importi tian vitron kaj fremdlandaj eksportantoj premis nin per alta prezo. Antaŭ la granda kultura revolucio nur malmultaj fabrikoj en nia lando povis produkti ĝin.

**Li Zujuan:** En la komenco ni ne havis ekipaĵojn, sed nur ĉambron kun spaco de 20 kvadrataj metroj kaj kelkaj simplaj instrumentoj. Iu diris: "Kvarcovitro estas la reĝo de vitroj, ĉu vi kapablas fari ĝin? Ridinda revo!" Sed ni pensis, ke se la laboristoj de Daking povis konstrui la grandan olekampon por la ŝtato en ege malfacilaj kondiĉoj, ankaŭ ni devas venki la malfacilojn. Sub la gvido de la partia filio, ni sep laboristoj tamen sukcesis, post pli ol 70 provoj, faris kvarcovitran tubon per memfarita rezistanca forno. Kaj poste ni faris kompleton da specialaj ekipaĵoj post plurfoja reformado kaj fondis fabrikon, kiu nun jam povas produkti pli ol cent specojn de kvarcovitraĵoj.



*Nova generacio de laboristoj en kreskado*



*Ekzamenado de produktaĵoj*

**Ĝang Gian:** Laŭdinda estas la revolucia spirito de la laboristoj de la kvarcovitra fabriko montrita en sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado kontraŭ malfaciloj. En 1971, la partia komitato de nia urbo alvokis la tutan urbon "lerni de Daking kaj kuratingi la Kvarcovitran Fabrikon", tiel ke leviĝis en Ŝaŝi alta



*Gelaboristoj studas revolucian teorion en postlaboraj horoj.*

tajdo de la movado por lernado de Daking. Por fondi malgrandajn fabrikojn tiu spirito estas necesa kaj dank' al tiu spirito la kondiĉoj povas ŝanĝiĝi kaj la produktado povas disvolviĝi. Nun en Ŝaŝi troviĝas pli ol 200 fabrikoj, el kiuj nur 9 estis fonditaj tute per ŝtata investo, kaj la ceteraj ĉiuj estis iom post iom disvolviĝintaj ĉefe dank' al la spirito de sinapogo sur propraj fortoj.

**Lu Sanjing**: Kiel la malgrandaj fabrikoj povas plimultigi la specojn de siaj produktaĵoj? Per senĉesa renovigo kaj reformado de la teknologio fare de la laboristoj sub la gvido de la Partio. Kiam nia fabriko de termoso fondiĝis en 1957, ĝiaj ekipaĵoj estis malmodernaj, ĝia teknologio estis postiĝinta, ĝiaj laboroj estis plejparte faritaj permane kaj tre lacigaj, dum ĝia produktokvanto estis malgranda.

**Li Zujuan**: Pri la manipulado laboristoj grumblis, ke oni devas ĉiam "blovfari buŝe, turnadi mane, transporti piedire".

**Lu Sanjing**: Tial la laboristoj de la tuta fabriko estis tre aktivaj en teknika renovigo. Ekzemple, por ŝanĝi la postiĝintan blovfaradon de vitra botelo de termoso, oni sukcesis elfari maŝinon por tio dank' al kuraĝigo de la partia komitato de la fabriko kaj nun oni povas fari 7 specojn de tiaj boteloj per maŝinoj. La laboristoj ne plu bezonis fari botelon per buŝblovado kaj multe altigis la produktokvanton. Niaj laboristinoj de desegnoŝpruciga sekcio ne volontis resti postiĝintaj, plurfoje reformis la teknologion kaj evidente altigis efikecon kaj kvaliton. Dank' al senĉesa renovigo de la laborprocedoj kaj formiĝo de 9 laborlinioj, la produktokvanto de termosoj en 1975 kreskis de 600,000 al 4,000,000 kaj ankaŭ la specoj ege multiĝis.

**Ĝang Gian**: La praktikado en la lastaj jaroj montris al ni, ke la ĉefa vojo por rapidigi la disvolviĝon de loka industrio estas sinapogi sur la saĝo de amasoj, samtempe disvolvi grandan, mezan kaj malgrandan entreprenojn, plene utiligi la ekzistantajn entreprenojn, energie fari teknikan renovigon kaj teknikan reformadon kaj ekspluati latentajn fortojn de la entreprenoj. Por fari iujn grandajn aŭ novajn produktaĵojn, kiujn unu fa-

briko ne povis, ni organizis plurajn fabrikojn aŭ eĉ la fortojn de la tuta urbo por solvi la problemon per kunlaboro en kampanjo. Ekzemple tiamaniere ni produktis multajn novajn maŝinojn kiel altrapidecan cilindran frotummaŝinon kaj programregatan drat-elektrodan tranĉmaŝinon.

**Ĝaŭ Zufu:** En la senĉesaj teknika renovigo kaj teknika reformado, ni fondis laboristajn universitatojn "La 21-a de Julio", mallongajn teknikajn kursojn kaj okazigis sciencajn kaj teknikajn prelegojn, per kiuj ni elkulturis propran teknikan laborantaron de la laborista klaso. Laŭ nia statistiko, en la komenca periodo post la Liberiĝo en Ŝaŝi estis nur 50 personoj kiuj iom sciis industriajn teknikojn, sed nun jam sin trovas ĉi tie pli ol 5,000 teknikaj fakuloj kaj laborantoj. Laboristo-inĝeniero kamarado Ĝaŭ Deŝeng ĝuste tiel kreskis.

**Ŝen Ĝengjing:** Lastatempe, la ŝtato decidis fondi grandan tekstilan fabrikon en Ŝaŝi, kaj ĉiuj kadroj, projektistoj kaj teknikistoj necesaj por tio estis liveritaj de la ekzistantaj entreprenoj de Ŝaŝi. Nun preparado estas glate farata por tio.


**Ĝaŭ Zufu:** La teknika nivelo de nia urbo multe altiĝis. Novaj teknikoj de elektroniko, fluidiko, numerala regado kaj simpla rekta numerala regado de maŝinoj, altrapideca frotumado, multpozicia prilaborado estas aplikitaj kaj disvastigitaj en iuj fabrikoj.

**Li Guangĝen:** Dank' al disvolviĝo de industrio, nia tuta urbo aliiĝis. La orienta antaŭurbo kun vasta sovaĝa tero kaj tombejoj fariĝis industria kvartalo, la plej larĝa strato Pekino kun magazenoj kaj loĝdomoj ambaŭflanke estas nove konstruitaj en la lastaj jaroj. La nombro de la loĝantoj de Ŝaŝi estas malpli ol duoblo de tiu antaŭ la Liberiĝo, sed la plankareo de ĝi 4.5-oblo. La higiena, eduka kaj trafika aferoj de Ŝaŝi rimarkinde progresis.

**Ĝang Gian:** Ĉu en disvolvo de industrio aŭ en entreprenado de aliaj aferoj ni ankoraŭ havas multe da farendaj laboroj. Sennombraj faktoj montris al ni, ke ni povas sukcesi en ĉiu ajn laboro, nur se ni persistas en la preno de klasbatalo kiel ĉefĉenero, plenumas la fundamentan linion de la Partio en la socialisma periodo, tutkore nin apogas sur la laboristaro, senĉese kritikas reviziismon kaj kapitalismon kaj persistas en la socialisma direkto. La grandioza celo elmetita de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso montris al ni senlime brilan estontecon. Ankaŭ ni jam faris nian planon por disvolvado kaj firme decidis persisti en tenado de la revolucio kaj akcelado de la produktado, konstrui nian socialiman novan Ŝaŝi ankoraŭ pli prospera kaj fari pli multan kontribuon al la ĉina popolo kaj la popolo de la tuta mondo.

**Raportisto:** Mi deziras al vi pli grandajn sukcesojn. Ni finu la hodiaŭan interparoladon. Dankojn al vi ĉiuj.

*La nove konstruita Pekin-strato*



CAŬ HIN:

# Ŝanĝiĝo de la Ŝanhaja



Kadroj kaj laboristoj kune resumas sperton en produktado.

# Kvina Ŝtala Fabriko

La nomita fabriko en la norda antaŭurbo de Ŝanhajo estas granda fabriko de specialaj ŝtaloj projektita kaj konstruita de la ĉina laborista klaso mem en 1958, la jaro de la Granda Antaŭensalto.

Antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, tiu ĉi fabriko iom disvolviĝis en produktado, tamen kun malgrandaj paŝoj. En la dek jaroj post la komenco de la kultura revolucio, kvankam neniom aldoniĝis al ĝi fabrikdomoj, ekipaĵoj kaj personoj, tamen la produktokvanto de ŝtalo de 1975 estis duoblo de tiu de 1965 kaj pli ol duoblo de ĝia antaŭprojektita kapablo, kaj ankaŭ la specoj de ŝtalo plimultiĝis de 1,800 ĝis 11,800. En la sepdekaj jaroj, la profito donita de la fabriko al la ŝtato en ĉiu paro de jaroj jam sufiĉas por konstrui novan samskalan fabrikon.

Kial tiu fabriko povis tiel rapide progresi en la Granda Proleta Kultura Revolucio?

## METI POLITIKON EN KOMANDON

La kadroj kaj la laboristoj de la Ŝanhaja Kvina Ŝtala Fabriko estas devenintaj de pli ol 300 entreprenoj de malsamaj profesioj de Ŝanhajo responde al la alvoko de la Partio pri energia fero- kaj ŝtalo-produktado en la jaro 1958. Ĉiuj ili havis fortegan deziron: Nepre rapide altigi la produktadon de fero kaj ŝtalo. Sed kion oni devas fari por atingi tiun celon? Antaŭ la kultura revolucio ili ne havis klaran ideon pri tio. Tiam influite de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki pri entreprenado, iuj kadroj de la fabrikoj kaj laborejoj zorgis nur pri produktado sed malofte pensis pri la direkto kaj linio en entreprenado. Ekzemple, por mobilizi la aktivecon de laboristoj al produktado, ili ne faris profundan kaj zorgeman politikan kaj ideologian laboron, sed sin turnis al materia stimulo kaj starigis diversaspecajn premiojn. Pro tio inter laboristoj kreskis malbona tendenco atenti nur la kvanton sed ne la kvaliton de la produktaĵoj, kaj ankaŭ ofte okazis disputado dum elektado de premiato. Kaj por starigi produktan ordon oni ne donis atenton pri altigo de la politika konscio de laboristoj, sed sin turnis blinde al specialistoj por ke ili fabriku serion da reguloj por "kateni" la laboristojn. Ĉar nemalmultaj el la reguloj estis neraciaj kaj apartiĝintaj de la praktiko, la iniciatemo de la laboristoj estis subpremita. Tiuj rimedoj deviigis la socialisman entreprenon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj multe malhelpis la produktadon.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la laboristoj kaj kadroj de tiu ĉi fabriko kune kritikis tiun reviziisman linion de entreprenado. Ili komprenis, ke pliprodukto dependas de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj de la politika konscio de laboristoj. La partia komitato de la fabriko atentis pri edukado al laboristoj kaj kadroj per Marksismo, Leninismo kaj Maŭzedongpenso. En la Dua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de la Partio en 1970 Prezidanto Maŭ persone faris instrukcion: **"Diligente legu librojn por bone posedi Marksismon".** Sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ, la partiaj organizaĵoj de la fabrika administracio kaj laborejoj ofte okazigis diversajn

kursojn por kadroj kaj laboristoj, kaj la fabriko starigis ankaŭ laboristan teorian trupon de pli ol 1,800 personoj kaj dank' al tio ĉiu produkta grupo havas sian teorian aktivulon.

Post studo de revolucia teorio, la kadroj kaj laboristoj levis sian konscion pri la batalo inter la marksisma kaj reviziisma linioj, kaj povas distingi burĝajn kaj reviziismajn pensojn kaj rezisti kontraŭ ili, tiel ke ili havis pli grandan energion en produktado. Ekz., en la fino de 1973, la laboristoj de la Dua Laborejo de Elektra Fornego proponis fari malgrandajn ŝtalingotojn el la malmulta ŝtallikvaĵo postlasita post ĉiu elverŝo por altigi la produktokvanton. Iu kadro administranta produktadon malalte taksis la socialisman aktivecon de laboristoj. Li opiniis ke la propono estas bona, tamen oni devas doni al laboristoj rekompencon por la aldonita laboro. La partia organizaĵo de la laborejo tuj montris akre, ke oni devas mobilizi la aktivecon de la laboristoj per proleta politiko, sed ne iri la malnovan vojon "meti premion en komandon". Ankaŭ la laboristoj esprimis per dazibaŭo: "Ni faras ŝtalingotojn por la popolo sed ne por rekompenco." Poste, tiu kadro kaj la laboristoj kune elmetis taŭgajn teknikajn rimedojn, tiel ke la postlasita ŝtallikvaĵo estis plene utiligita tute sen materia instigo.

Tiel faris ankaŭ la Unua Laborejo de Elektra Fornego. Post studo pri marksisma politika ekonomiko, ĝiaj laboristoj analizis laŭ marksisma fundamenta vidpunkto la rilatojn inter homoj en produktado kaj trovis problemojn en ordinaraj fenomenoj. En la pasinteco, tiu ĉi laborejo dividis la ses laboristojn antaŭ la fornego en ses klasojn. La laboristoj opiniis, ke en socia produktado, labordivido estas necesa, sed tia labordivido de la laborejo estas influita de sistemo de klasoj, kio malhelpas disvolvon de aktiveco de laboristoj kaj ilian solidarecon kaj kunlaboron kaj facile kreskigas koncepton pri rango en laboristoj. Tial tio malutilis al revoluciigo de ideologio de homoj kaj disvolvo de produkta forto. Post profundiĝo de sia kompreno, la laboristoj elmetis sloganon: "Kvankam diferencaj estas niaj laboroj, tamen ni ĉiuj estas mastroj de la ŝtato." Tiu slogano ŝanĝis la antaŭan mekanikan labordividon. La fornestro ne nur zorgas pri elforniĝo de ŝtallikvaĵo sed ankaŭ faras kion faras aliaj grupanoj; kaj la lastaj obeas la komandon de la fornestro kaj samtempe povas lerni de la fornestro manipuladon de malfacila tekniko kaj alta postulo. Jen ekaperis antaŭ la fornego nova atmosfero de solidareco kaj kunlaboro por akiri altan produkton. La laborista teoria grupo faris komentarion pri tiuj avangardaj tipoj laŭ marksisma vidpunkto, verkis artikolon titolitan "Elektitaj ekzemploj de politika ekonomiko antaŭ la fornego", kaj lekciis tion inter amasoj, kio plue altigis ilian laboran entuziasmon.


## ĈIAM ZORGI INTERESOJN DE LA ŜTATO

La Ŝanhaja Kvina Ŝtala Fabriko provizas preskaŭ dekmil uzantojn de la tuta lando per siaj produktaĵoj. De la komenco de la kultura revolucio profundaj ŝanĝoj okazis al la rilato inter ili kaj ankaŭ tio akcelis la disvolviĝon de la fabriko.

Ni unue rakontu kiel la fabriko helpis la Ŝanhajan Fabrikon de Instrumentoj en ĝia "montotranslokado".

La nomita instrumenta fabriko produktas metaltranĉilojn el altrapida ŝtalo produktita de la Ŝanhaja Kvina Ŝtala Fabriko. La granda kvanto da ŝtalruboj estigita dum la longa produktado formis kelkajn "montetojn". La fabriko de instrumentoj petis ŜKŜF reporti la ŝtalrubojn por reprodukto. Iu respondeculo de tiu fabriko opiniis, ke la ŝtalruboj estas eluzitaĵoj kaj devas esti reprenitaj de la kompanio de eluzitaĵoj. Kia ŝarĝo estus por la nomita fabriko, se ĉiuj aliaj fabrikoj transportus tiajn ŝtalrubojn al ĝi. Kaj krome, la reprodukto konsumos pli longan tempon kaj facile difektos fornegon kio portos neniom da profito al la fabriko. Tial li rifuzis senhezite.

Se tio okazus antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, la afero do finiĝus tiamaniere. Sed la kadroj kaj laboristoj harditaj de la kultura revolucio konsciis ke tio estas elmontriĝo de la jam kritikita penso "meti profiton en komandon" kaj grupa egoismo en la cerbo de la gvidanto. Ili opiniis ke kiel socialisma entrepreno de tutpopola posedsistemo la Ŝanhaja Kvina




*Muldado per teledirekta aparato projektita kaj farita de laboristoj mem*

Ŝtala Fabriko produktas ne por akiri profiton sed por la interesoj de la popolo kaj por konstrui socialismon. Per repreno de la ŝtalruboj ĝi ne nur povas helpi fratajn fabrikojn forigi la eluzitaĵojn sed ankaŭ pliprodukti por la ŝtato valoregan altrapidan ŝtalon. Ĉu oni devas rifuzi tion pro "neprofitigo"? La Unua Laborejo de Elektra Fornego rezolute petis ke la partia komitato de la fabriko donu al ĝi la taskon refandi la ŝtalrubojn. De tiam ŜKŜF ĉiujare povas pliprodukti konsiderindan kvanton da bonkvalita altrapida ŝtalo el la ŝtalruboj reprenitaj el la fabriko de instrumentoj kaj aliaj entreprenoj.

En la lastaj jaroj, kiam okazis kontraŭdiroj inter la interesoj de la fabriko kaj tiuj de la tutlanda socialisma konstruado dum planado kaj kontraktado kaj kunlaborado kun aliaj unuoj, la kadroj kaj laboristoj de la fabriko ĉiam memoris la lecionojn elĉerpitajn en traktado de la ŝtalruboj, kaj ili pli konscience plenumis la bezonon de la tuta lando. Ili ĉiam entuziasme prenis al si ĉiun ajn taskon, nur se ĝi estis bezonata de la socialisma afero, kaj por tio ili eĉ spitis malprofiton.

Foje, kadroj kaj laboristoj de la Kvina Laborejo vizitis uzanton-fabrikon, kie ili rimarkis ke nur 70-80% el la normaj ŝtalaĵoj laminatitaj de ili taŭgas por la celo. Kie kuŝis la kaŭzo? Post serioza esplorado ili trovis, ke sur la kontrakto la uzanto ne klare skribis la specialajn postulojn kaj pro tio mankis al la produktaĵo kvin labor-

procedoj. Poste la Kvina Laborejo meminiciate aldonis la kvin laborprocedojn al la produktado. Kvankam tio altigis la produktan koston kaj malaltigis la profiton de la Kvina Laborejo, tamen preskaŭ la tutaj ŝtalaĵoj fariĝis uzeblaj por la uzanto.

En la lastaj jaroj la Ŝanhaja Kvina Ŝtala Fabriko kun plezuro produktis la de la ŝtato urĝe bezonatajn produktaĵojn de kelkdek-tunaj grandaj ŝtalingotoj ĝis unu unco da medicinaj kapilaraj tuboj. En plenumado de tiuj taskoj, ili grandskale altigis la produktokvanton kaj multigis la produktospecojn kaj ankaŭ sukcesis en prova fabrikado de certa nombro da produktaĵoj, kiuj plenigis breĉojn en nacidefenda kaj plej avangarda industrioj.

## TUTKORE SINAPOGI SUR LABORISTOJ

Nun en la fabrika oficejo kaj laborejaj kabinetoj de la Kvina Ŝtala Fabriko oni ĉiam povas vidi dazibaŭ-ojn algluitajn de laboristoj, en kiuj ili esprimas siajn opiniojn pri diversaj laboroj kaj laborstilo de diversnivelaj kadroj. En la Granda Proleta Kultura Revolucio la laboristoj pluapaŝe altigis sian respondecemon kiel mastroj de la fabriko kaj ankaŭ la kadroj de la diversnivelaj partiaj organizaĵoj de la fabriko altigis sian konsciencon tutkore sin apogi sur la laborista klaso.

En la lastaj jaroj la partia komitato de la Kvina Ŝtala Fabriko ĉiam rekte petis opiniojn de laboristoj ĉu pri la gravaj problemoj koncernantaj la direkton kaj linion aŭ pri konkretaj produktaj kaj teknikaj problemoj. La partia komitato ĉiam varme subtenas kaj serioze traktas la dazibaŭ-ojn de laboristoj kaj ĉiamaniere klopodas por solvi la problemojn kun koncernaj fakoj tuŝitajn en la dazibaŭ-oj. En la unua duono de la pasinta jaro, laboristoj de la 12-a Laborejo k. a. elmetis dazibaŭ-ojn koncerne al la supraĵema laborstilo de iuj kadroj en gvidado de produktado. La partia komitato de la fabriko esprimis sian subtenon al la ĝustaj opinioj de la laboristoj kaj tio multe edukis la koncernajn kadrojn, tiel ke ili plibonigis sian laborstilon kaj pliintimigis sian rilaton kun la laboristoj. Kiam iuj kadroj ne povis ĝuste trakti la opiniojn de laboristoj, la diversnivelaj partiaj organizaĵoj faris al ili ideologian laboron. La acida baseno de la 13-a Laborejo estis longe neriparita, kio malhelpis la produktadon. Pri tio laboristoj elmetis nemalmultajn kritikojn, pri kiuj tamen la kadroj administrantaj produktadon ne donis atenton kaj prokrastis la riparadon. Poste la laboristoj kritikis ilin per dazibaŭ-o. Komence iuj kadroj ne akceptis la kritikon. La partia organizaĵo de la laborejo opiniis, ke la kritiko de la laboristoj pri la burokrata laborstilo de la kadroj estas ĝusta. La gvidantoj de la partia organizaĵo kaj la administrantoj de produktado do kune iris konsulti la laboristojn kaj sekve de tio tuj solviĝis la problemo.

En praktikado, la kadroj de la Ŝanhaja Kvina Ŝtala Fabriko komprenis, ke la amaso estas vera heroo kaj ĉiu ajn problemo povas esti tuj solvita, se oni tutkore sin apogas sur ili kaj atentas ilian iniciatemon. Antaŭ la kultura revolucio la fabriko volis fabriki vakuan fandfornon sin apogante nur sur malmultaj specialistoj kaj teknikistoj kun fermita pordo, kaj konsuminte cent mil juanojn ĝi tamen neniom sukcesis. En la kultura revolucio, la fabriko organizis la kombiniĝan grupon kun laboristoj kiel ĉefa forto kaj kun partopreno de gvidantaj kadroj kaj teknikistoj. Ili rompis fremdlandajn rutinojn kaj mem projektis kaj fabrikis en 1969 la unuan vakuan fandfornon kun aparta stilo de Ĉinio. En la komenco de la pasinta jaro, iu granda konstruo de Ŝanhajo urĝe bezonis nombron da novaj altklasaj neferaj alojaj korodimunaj tuboj. Tiaj tuboj antaŭe estis importitaj, sed la fremdlandaj kapitalistoj ruze altigis la prezon. Informiĝinte pri tio, la laboristoj de la 6-a Laborejo decidis mem fabriki tiajn tubojn. Ilia revolucia spirito kuraĝe preni pezan ŝarĝon al si ricevis varman subtenon de la partiaj organizaĵoj de la fabriko kaj laborejo. Venkinte multajn malfacilojn la laboristoj ĝustatempe fabrikis tiajn tubojn sur sia laminatilo por feraj metaloj kaj subtenis per ili la konstruadon.

Multaj vivecaj ekzemploj de la Ŝanhaja Kvina Ŝtala Fabriko diras al ni, ke la Granda Proleta Kultura Revolucio altigis la nivelon de politika konscio de la kadroj kaj laboristoj, kaj sekve de tio altiĝis ankaŭ la produktokvanto.

# Nova Fizionomio de la Ŝanhaja Kvina Ŝtala Fabriko

Ŝtala likvo el elektra fornego







Laboristoj en studo de teorio






Revolucia kritikado






Transporto de varmaj ŝtalaj ingotoj




Antaŭ fornego





Ekzameno de maldikaj senjuntaj ŝtalaj tuboj



En laminatejo



Grupo de triflanka kombiniĝo de laboristoj, kadroj kaj teknikistoj en interkonsiliĝo pri teknika problemo

KE HONG:

# Amasa debato en la sciencaj kaj teknikaj rondoj

PLI kaj pli profundiĝas la amasa revolucia debato en la sciencaj kaj teknikaj rondoj de Ĉinio. Ĉie troviĝas debataj dazibaŭoj ĉu en la kortoj de la oficejo de la Ĉina Akademio de Sciencoj aŭ en la koridoroj de la etaĝdomoj de fakaj institutoj de diversaj lokoj.

Tiu ĉi debato estas provokita de enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la situacio, kiam serio da revoluciaj ŝanĝoj estas faritaj laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ en la scienca kaj teknika sfero depost la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj

*Laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de la Dalian-a Kemi-fizika Instituto firme subtenas la du rezoluciojn de CK de KPĈ kaj indigne kritikas la krimojn de Deng Hiaŭping.*



ĉiam pli grandaj sukcesoj estas atingitaj. Ĉirkaŭ somero de la pasinta jaro, instigate de Deng Hiaŭping, la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj rifuzanta pentofaron, malmultaj gvidantoj de la sciencaj kaj teknikaj rondoj, kiuj persistas en la reviziisma linio, neigis la sukcesojn atingitajn pro la novigoj en la scienca kaj teknika fronto kaj klopodis por treni la sciencan esploradon al la reviziisma vojo antaŭ la granda kultura revolucio.

La nuna debato estas rezoluta rebato de la revoluciaj amasoj de la sciencaj kaj teknikaj rondoj al la reakcia ago de tiuj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Ĝi estas konsistiga parto de la batalo de kritikado al la reviziisma linio, la batalo persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ por rebati la venton de la dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn.

Respondeculo de la Ĉina Akademio de Sciencoj diris: "La esenco de tiu ĉi amasa debato estas ĉu oni devas persisti en la marksisma linio kaj iri la socialisman vojon aŭ praktiki reviziisman linion kaj iri la kapitalisman vojon en disvolvado de sciencoj kaj teknikoj en Ĉinio." Li montris, ke la amasa debato certe forte akcelos la prosperiĝon kaj disvolviĝon de la socialismaj scienca kaj teknika aferoj de Ĉinio.


Ĉu la sciencesploraj laboroj devas esti farataj kun malfermita aŭ fermita pordo? Tio estas unu el la gravaj demandoj de la debato.

En la kultura revolucio, la sciencaj kaj teknikaj laborantoj kritikis la reviziisman linion, laŭ kiu oni faris sciencan esploradon en domegoj de institutoj apartigite de la proleta politiko, de la laboristoj kaj kamparanoj kaj la reala produktado. Ili eliris el la institutoj, kombiniĝis kun laboristoj kaj kamparanoj kaj faris sciencesplorajn aktivadojn laŭ la bezono de la ŝtato kaj la produktado. Farado de scienca esploro kun malfermita pordo estas profunda renovigo en la scienca kaj teknika sfero, kiu manifestis la socialisman direkton, ke la scienca esplorado devas servi al la proleta politiko, al la laboristoj,

*Sciencistoj kaj teknikistoj de la Biofizika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj iros al kamparo por ricevi reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.*



*Biokemiaj laborantoj en eksperimentado*



kamparanoj kaj soldatoj kaj kombiniĝi kun produkta laboro kaj starigis la novajn rilatojn de kombiniĝo de profesiaj laborantoj kun popolamasoj, kombiniĝo de scienca esplorado kun produktado kaj kombiniĝo de teorio kun praktiko en la sciencesploraj laboroj.

Sed enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon plenenergie oponis kontraŭ tio, kalumniante ke tio "malutilas al la altigo de teorio".

Laborantoj de la Genetika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj forte refutis ilin per komparo de faktoj antaŭ kaj post la granda kultura revolucio.

Antaŭ la granda kultura revolucio, nemalmultaj esplorantoj de la instituto sidadis en ĉambroj legante librojn aŭ farante eksperimenton. Ili elektis por si studajn temojn el fremdlanda literaturo kaj multaj el iliaj studaj objektoj estis sensignifaj por la socialisma konstruado de la lando. Ekzemple oni esploris kiel karaso fariĝis orfiŝo kaj kiel okazis kolorŝanĝo de la fruktoŝelo, kiam oni greftas blankan melongenon al purpura melongeno. Kvin personoj okupiĝis pri la lasta esplora temo en laboratorio pli ol 7 jarojn kaj konsumis 50,000 juanojn. La fruktoj de la esploraj laboroj de tiu instituto en tiu tempo estis nemultaj, el kiuj ankoraŭ pli malmultaj povis aplikiĝi al produktado.


Post la komenco de la granda kultura revolucio, la laborantoj de la instituto iris unuj post aliaj al kamparo, brutobredaj regionoj kaj fabrikoj. Ili difinis esplorajn temojn laŭ la bezono de la industria kaj agrikultura produktado kaj pli ol 80 pocentoj de la fruktoj de iliaj esploraj laboroj povas esti aplikitaj en produktado. Ekzemple, por rapidigi la generadon de Sanbej-ŝafido, kies felo havas altan ekonomian valoron, ili faris eksperimentojn en la brutobredaj regionoj de Interna Mongolio kaj Ninghia. Ili transmetis fekundigitajn ovolojn de tia ŝafino en la uteron de mongola ŝafino, kiu havas malaltan ekonomian valoron sed fortan generan povon, kaj sukcesis en tio post dujara laborado. Por plenumi la fortan postulon de kamparanoj mallongigi la tempon de elkulturo de bonaj specioj de plantoj, ili faris esploradon pri kulturado de planto el poleno kaj sukcesis elkulturi plantojn el poleno de tritiko kaj maizo. Per la nova metodo oni povas liveri novan specion aplikeblan al produktado en ĉ. 3 jaroj, t. e. multe pli rapide ol per la hibridigado.

Antaŭ la granda kultura revolucio, la reviziisma linio logis la sciencesplorajn laborantojn per famiĝo kaj specialistiĝo, tiel ke inundis la burĝa laborstilo de reciproka blokado kaj sekretigo de teknikoj, kiu estas kontraŭa al socialismo. Tiam la sciencaj laborantoj staris super la amasoj kaj malestimis fizikan laboron kaj laboristojn kaj kamparanojn. Post la funkciigado de instituto kun malfermita pordo, ili eliris por kontakti laboristojn kaj kamparanojn, lerni iliajn revoluciajn pensojn kaj bonajn kvalitojn kaj kritikis la burĝan penson de ĉasado de persona honoro kaj profito, kio akcelas la reformon de ilia mondkoncepto. Nun interhelpado kaj solidara kunlaborado jam fariĝis nova laborstilo de la sciencaj laborantoj.

Ĉu oni devas sin apogi sur nur malmultaj specialistoj aŭ la vastaj amasoj en disvolvo de socialismaj sciencoj kaj teknikoj? Tio estas alia grava demando de la debato.


De la komenco de la granda kultura revolucio, amasa movado estas energie disvolvata en la scienca laboro de nia lando, kaj laboristoj kaj kamparanoj, kiuj estis fermitaj ekster la pordo de scienca esplorado antaŭe, vaste partoprenis en sciencaj esploroj. Tio ĉi estas grava karakterizaĵo en la disvolviĝo de la socialisma scienca afero. Nun en fabrikoj de nia lando ĝenerale fondiĝis sciencesploraj grupoj de laboristoj, kadroj kaj teknikistoj en kombino, en pli ol cent urboj disvolviĝis aktivadoj de interŝanĝo de sciencesploraj spertoj kaj miloj kaj miloj da laboristoj kun praktika sperto ascendis la scenejon de scienca esplorado. En sciencaj institucioj pri petrol-kemia industrio, la laboristoj-esploristoj konsistigas ĉ. 50 pocentojn de la sciencesplora personaro. En gubernioj, komunumoj, brigadoj kaj taĉmentoj de la kamparo jam ĝenerale fondiĝis agronomiaj eksperimentaj grupoj kaj pli ol 13 milionoj da kamparanoj partoprenis en diversaj agronomiaj eksperimentaj aktivadoj. Ĉio tio montras, ke dank' al la kultura revolucio, la sciencesplora laboro de Ĉinio jam disrompis la monopoladon de malmultaj intelektuloj kaj fariĝis afero de milionoj da popolanoj.

Enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon oponis kontraŭ sciencesplora laboro fare de la amasoj opiniante, ke sufiĉas "centoj da unuarangaj kaj duarangaj sciencistoj" por disvolvi la sciencojn kaj teknikojn de Ĉinio. Ili diris, ke "la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kun malalta klereco" ne estas kompetentaj en sciencaj laboroj.



*La Instituto de Moderna Fiziko sukcese fabrikis diversspecajn transistorajn detektilojn per la nova jono-eniga tekniko.*

*Sciencesploraj laborantoj de Pekino praktikantaj sur Hajnan-insulo okazigas kunsidon por kritiki reviziismon.*



Laŭ marksisma-leninisma vidpunkto kaj per vivecaj faktoj la vastaj amasoj forte refutis tiajn absurdajn opiniojn. Sennombraj faktoj pruvis, ke la historio kaj sciencoj estas kreitaj de la laboranta popolo sed ne de malmultaj "genioj". La laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas la ĉefforto de produktado kaj ankaŭ devas esti la ĉefforto en scienca eksperimentado.

En la pasinta jaro, 70-jara terkulturisto Li Guangking de Hunan-provinco kreis novan rekordon de meznombra hektara produktokvanto de 24,405 kilogramoj da tritiko kaj rizo sur sia 0.32 hektaro da eksperimenta kampo kun unu rikolto de tritiko kaj du rikoltoj de rizo en unu jaro. Kore-nacieca maljuna terkulturisto Li Ĝengŝeng de Gilin-provinco kuraĝe faris hibridigon de rizo kaj maizo kaj sukcesis elkulturi maizan rizon kun grandaj spikoj kaj dikaj grajnoj, kiu povas multe produkti. Lia sukceso en la malfacila hibridigo elmetis novan studobjekton al genetika esplorado. La fama kamparano-speciokulturisto de Henan-provinco Li Dejan, kiu sukcesis elkulturi pli ol 50 bonajn speciojn de tritiko, fariĝis membro de la redakcia komitato de la gazeto "Genetiko" de la Ĉina Akademio de Sciencoj en la granda kultura revolucio kaj partoprenis en la redaktado de la verko "Speciokulturado de Tritiko", la unua de sia specio en Ĉinio. Laboristoj kaj teknikistoj de la petrolkampo Daking kune atingis centojn da sukcesoj en scienca esplorado, kreis kompleton de nova olekolekta teknologio kun apartaj karakterizaĵoj konformaj al nia lando kaj dank' al tio stabila alta produktado daŭris en la pasintaj dekkelkaj jaroj. Veterana laboristo Ĝang Ĝongĉeng sukcesis eltrovi novan teknologion por forigo de vakso kaj prevento de apero de vakso en oletubo kaj tiu ordinara analizisto fariĝis estro de la sciencesplora sekcio.

En la debato la vastaj amasoj montris, ke la profesiaj laborantoj nepre devas kombiniĝi kun la amasoj. Nia lando estas socialisma lando, la laboristaj kaj kamparanaj amasoj estas la mastroj de la ŝtato. Por disvolvi sciencojn kaj teknikojn per niaj propraj fortoj, ni nepre devas nin apogi sur la saĝo kaj fortoj de la vastaj amasoj.

Kiu devas gvidi la sciencesploran laboron? Pri tio ĉiam ekzistas batalo inter la du linioj.

Antaŭ la granda kultura revolucio, Liu Ŝaŭki kaj liaj sekvantoj antaŭenpuŝis reviziisman linion "administri instituton per specialistoj",

pretekstante ke la partianoj-gvidantoj "ne scias sciencojn" kaj "laikoj ne povas gvidi fakulojn". Multaj sciencesploraj institucioj estis regataj de burĝaj intelektuloj kaj la linio, principo kaj politiko de la Partio ne povis esti efektivigataj. En la granda kultura revolucio, tiu linio estis kritikita. Laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj marŝis en sciencesplorajn instituciojn, plifortigis la gvidon de la Partio al ili kaj reprenis la gvidantecon en la scienca sfero.

Enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon tamen energie distrumpetis, ke oni devas lasi la "unuarangajn" "aŭtoritatulojn" "rekonatajn de la sciencaj rondoj" estri la institutojn kaj la "sekretarioj de la partiaj komitatoj ne ordonu" sed "obeu la estrojn de la institutoj".

Vastaj amasoj montris, ke tio estas ja kopio de la reviziisma linio praktikita antaŭ la granda kultura revolucio, kiu oponis kontraŭ la gvido de la Partio, forpuŝis la laboristojn kaj kamparanojn kaj funkciigis sciencesploradon per burĝaj intelektuloj! La scienca kaj teknika pozicio estis longe okupata de la burĝaro kun supereco en kulturaj scioj, kie la antaŭjuĝoj kaj tradiciaj fortoj de la burĝaro havas profundan radikon. Post la Liberiĝo, ĉiam akre iris la batalo inter la proletaro kaj la burĝaro por la gvidanteco de la sciencesploraj laboroj. La enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon klopodadis kun la vana espero nuligi aŭ malfortigi la gvidon de la Partio, kaj tio efektive signifas lasi la burĝaron plue teni superecon en tiu pozicio kaj praktiki diktaturon super la proletaro. Tial estas necese plifortigi la gvidadon de la Partio kaj praktiki plenampleksan diktaturon de la proletaro super la burĝaro en sciencaj laboroj por garantii, ke la scienca kaj teknika afero disvolviĝu laŭ la socialisma direkto.

*Laborantoj de la Oranĝoesplora Instituto trejnas teknikistojn por kamparo.*



ĜAŬ JUELIANG:

# Por ekstermi talpogrilojn



*Observado de aktivado de talpogriloj en pluva nokto*

MI estas membro de popola komunumo en Ŝanhi-provinco, norda Ĉinio. En la movado de lernado de Daĝaj, mi kaj la kamaradoj de la sciencesplora grupo de nia Nanhu-brigado persistis en sciencaj eksperimentoj dum 10 jaroj, kontribuante al la agrikultura pliprodukto per eltrovo de metodoj kontraŭ fiinsekto talpogrilo, kiu detruas plantojn subtere. En 1974, mia disertaĵo «Pri la vivo kaj ekstermado de talpogriloj» aperis en la gazeto *Sciencoj de Ĉinio* kaj la Agronomia Instituto de Ŝanhi invitis min labori kiel ĝian kumulan instruiston. Mi estis malriĉa analfabeto en la malnova socio. Mia nuna atingo estas rezulto de la edukado de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio.

En mia hejmloko Dongcun-komunumo de Hinhian-gubernio, la talpogrilo estas ĉefa fiinsekto malutila al plantoj. Troviĝas du specoj de talpogrilo, nome la nordĉinia *(Gryllotalpa unispina)* kaj la afrika *(Gryllotalpa africana)*. Ili ŝatas manĝi plantoradikojn kaj fosi tuneletojn, kaŭzante morton al plantoj per rompo de la radikoj kaj grave damaĝante la agrikulturan produktadon.

En la malnova Ĉinio, en nia vilaĝo Nanhu, same kiel en la aliaj vilaĝoj de la tuta lando, sub kateno de la duonfeŭdaj kaj duonkoloniismaj produktaj interrilatoj, tre postrestis la produktado. Tiam la kampoj estis salaj-alkalaj, malaltaj kaj malsekaj, ili plenis de herbaĉoj pro kruda kulturado, tiel ke tie amase nestis talpogriloj kaj aliaj fiinsektoj. Tiam la malriĉaj kamparanoj ne nur estis kruele subpremataj kaj ekspluatataj de la kuomintanga reakcia registaro kaj la lokaj bienuloj, sed ankaŭ damaĝataj de talpogriloj kaj aliaj fiinsektoj. En la plej sterilaj jaroj oni povis rikolti eĉ neniun grajnon. Tiam la malriĉaj kamparanoj devis forvendi siajn infanojn kaj almozpeti en aliaj lokoj.

Sekve de la naskiĝo de la nova Ĉinio, ni laboranta popolo fariĝis la mastroj de la agraro kaj kun granda entuziasmo nin ĵetis en la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon sub la gvido de la Partio. Kvankam ni faris ion por preventi kaj elimini la atakojn de talpogriloj, tamen pro la influo de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, niaj pensoj estis ankoraŭ katenitaj kaj ni ne aŭdacis kuraĝe agi kaj ne sukcesis trovi efikan metodon kontraŭ tiu fiinsekto.

En 1965, la partia filio de la brigado decidis establi sciencesploran grupon sub mia gvido kaj kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel ĉefa parto por speciale eltrovi metodon kontraŭ talpogriloj. La sekretario de la partia filio Ĝaŭ Huangju kore diris al mi: "Tio ja estas grava afero, Jueliang, ke ni kamparanoj nun entreprenas sciencan esploradon! En la pasinteco, la reakcia klaso propagandis, ke la vivo estas antaŭdecidita de la sorto kaj la riĉeco estas destinita de dio, kaj deklaris, ke ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas destinitaj al sufero de ekspluatado kaj subpremado kaj povas nur submetiĝi al la ka-


prico de dio. Hodiaŭ, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio ni jam liberiĝis tiel en politiko kiel en ekonomio, kaj ni certe povos konkeri la kampon de scienca esplorado kaj fariĝi mastro de la naturo." La vortoj de la sekretario de la partia filio instigis min al meditado: Mi estas komunisto kaj mi nepre ne vanigos la esperon de la Partio kaj popolo en plenumo de la tasko asignita al mi. Kun plena memfido nia grupo akceptis la taskon.

Pro manko de sperto en la komenco, ni ne sciis de kie komenci por ekkoni la dislokiĝon de la talpogriloj sub la tero kaj devis apliki la metodon rekomenditan de libroj. Ni fosis el tipa parcelo certan kvanton da tero, elkribris el ĝi talpogrilojn por difini laŭ rezono la nombron de la fiinsektoj en la tuta areo. Tiamaniere ni esploris du jarojn, tamen ne sukcesis konstati la densecon de la talpogriloj en la kampoj. Pro tio mi tiel maltrankviliĝis, ke mi perdis la apetiton kaj dormemon, sed tamen ne povis trovi solvon de la problemo.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, en nia Nanhu-brigado leviĝis tajdo de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Nia grupo bone studis lian verkon «Pri Praktiko». Prezidanto Maŭ diras: **"Kiu ajn volas ion koni, ne povas fari alimaniere ol kontakti kun tio, t.e. vivi (praktiki) en ties cirkonstancoj."** Ni pensis, ke kvankam ni ne povas vidi la aktivadon de la talpogrilo sub la tero, tamen ĝi ankaŭ elrampas el la tero. Se ni atente observos, ni certe ekkonos la leĝon de ĝia aktivado.

Tiel ni ĉiutage serĉadis en kampoj de la mateno ĝis la vespero signojn de aktivado de talpogriloj. Post observado surloke dum certa tempo ni trovis, ke en la lasta tagdeko de marto kaj la unua tagdeko de aprilo la nordĉiniaj talpogriloj faris novan tuneleton tuj sub la tersurfaco formante elstaraĵon sur la tero kun longeco de ĉirkaŭ 10 centimentroj kaj ĉe la afrikaj talpogriloj la elstaraĵo el malkompakta tero estas en formo de senpintaj konusoj. Se ĝi trovas ke estas sufiĉe varme, ĝi elrampas, se ne, ĝi retiriĝas en la neston. Laŭ la nombro de elstaraĵoj el malkompakta tero ni povas difini la nombron kaj densecon de talpogriloj en kampo. Dank' al tio ni elfosis grandan kvanton da talpogriloj. Tio ebligas okulan spuradon por konstati la specojn, densecon kaj movdirekton de talpogriloj en kampoj, sen malhelpo al la terkultura laboro kiel la malnova metodo antaŭe tion kaŭzis. Kaj krome ĝi estas simpla, facile uzebla kaj postulanta malmulte da laboro, tial ĝi estas tre bonvenaj al la komunumanoj.

En daŭra esplorado pri la vivkutimo kaj pri la leĝo de aktivado de talpogriloj ni trovis, ke ili sin kaŝas tage kaj aktivadas nokte. En someraj kaj aŭtunaj noktoj ili aktivas plej vigle kaj plej serioze detruas plantojn. Kaj ni trovis, ke ĉiujare de majo ĝis aŭgusto estas la genera periodo de talpogriloj. Kaj krome ni observadis



*Ekstermado de talpogriloj per insekticido*

la elkoviĝadon de talpogrilo en laboratorio, farante notojn kaj desegnojn kaj havigis al ni ĝenerale unuamanan materialon pri la tuta evolua proceso de tiu fiinsekto.

En dek jaroj, ni sekcis ĉ. mil talpogrilojn, tiel ke ni klare ekkonis la morfologiajn diferencojn inter la nordĉiniaj kaj afrikaj talpogriloj kaj jam povis distingi la talpogrilojn laŭ sekso. Tiu esploro havas valoron por ĝustatempe elfosi ovojn de talpogrilo kaj ilin neniigi.

Nia aktivado por ekstermi fiinsektojn ricevis energian subtenon kaj prizorgon de la partia filio de la brigado kaj la supera gvida instanco. La partia filio de la brigado ofte kuraĝigis nin praktikadi senhezite kaj helpis nin en solvo de malfaciloj. La gubernia gvidantaro sendis al ni teknikiston por esplori kaj resumi sperton kune kun ni. En 10-jara persistado de scienca eksperimentado, ni akiris serion da ĝojindaj sukcesoj. Ni mortigis 4,480,000 talpogrilojn, kaj lige kun la fundamenta konstruado de kampoj reformis la grundon por neniigi la vivkondiĉojn de tiu fiinsekto. Ni profunde plugas je la fino de aŭtuno kaj komenco de vintro en ĉiu jaro por detrui la talpogrilajn travintrajn nestojn; somere ni erpas kaj ebenigas kampojn por detrui iliajn ovodemetejojn, por senigi al talpogrilidoj taŭgajn vivkondiĉojn; ni turnas la kampojn, kiujn plej atakis dum la pasinteco talpogriloj, en akvokampojn por ke la talpogriloj dronu. Nun nia brigado jam povas fundamente limigi la damaĝon de la talpogriloj al la plantoj. Antaŭ 9 jaroj, 30 pocentoj de niaj kampoj havis breĉojn en la plantovicoj pro detruado de talpogriloj, sed nun nur malpli ol 2 pocentoj. Kaj dank' al apliko de aliaj pliproduktigaj rimedoj, la meznombra hektara produktokvanto de la tuta brigado altiĝis de ĉ. 1,500-2,250 kg. antaŭ dek jaroj ĝis ĉ. 7,000 kg. en la nuna tempo. La komunumanoj ĝoje diris: "La malnovaj nestejoj de fiinsektoj nun fariĝis altproduktaj kampoj."

En la lastaj jaroj, nia sperto en ekstermado de talpogriloj jam estis disvastigita en Hinhian. En tiu regiono oni disvolvis amasan kampanjon por ekstermi talpogrilojn k.a. subterajn fiinsektojn en ĉ. 700,000 hektaroj da kampoj. Antaŭe la areo de kampoj kun maldensaj plantoj pro detruado de talpogriloj konsistigis 20% de la totala kamparo, sed nun ĝi reduktiĝis ĝis 5%. Tio pretigis bonan kondiĉon por pliigo de la produktokvanto.

VANG JUĴU:

# Kiel popola leterportisto

Mi estas juna leterportistino de Pekino. Kiam mi suriris mian laborpostenon en 1970, mi estis ankoraŭ tre naiva. Dank' al la hardado en la arda revolucia batalo en la pasintaj jaroj, mi fariĝis glora kompartianino kaj relative sperta leterportistino. Mia progresado estas rezulto de la kora zorgado de la Partio kaj la popolo.

Diplomite el mezlernejo, mi forte deziris min ĵeti en la ardan socialisman konstruadon. Sed kiam mi informiĝis, ke mi estis asignita al poŝtoficeja laboro, mia koro ekbolis de maltrankvilo. Mi pensis: kian kontribuon mi povos fari al la popolo, se mi ĉiutage nur disportados leterojn kaj ĵurnalojn kaj vendados poŝtmarkojn! Tiam iu laboristo, kiu gvidis en nia lernejo la



*Vang Juju*

edukan revolucion, divenis mian penson kaj demandis min, kion diris mia petskribo esprimanta mian decidon je la diplomitiĝo. Mi respondis al li senhezite: "Revolucia junulo estas kvazaŭ briko kaj devas esti metita tie kie ĝi estas bezonata. Mi donos min senrezerve al la popolo kaj tute obeos la aranĝon de la Partio." La laboristo diris: "Bone vi diris. Sed kial vi hezitas nun, kiam la posteno de la popola poŝto vin bezonas?" Li admonis min serioze: "Bone memoru la ardan esperon de Prezidanto Maŭ al la junuloj kaj la flegadon kaj postulon de la popolo al vi." Kaj ankaŭ miaj gepatroj kuraĝigis min, ke mi plenumu la bezonon de la revolucio kaj tutkore servu al la popolo. Iliaj admonoj sentigis al mi varmegon en la koro kaj malligiĝis la nodo en mia penso. Mi ĝoje suriris la postenon de poŝtisto.

La partia organizo kaj la malnovaj poŝtistoj atenteme prizorgis kaj edukis min. Ili prezentis al mi lernindajn farojn de modelaj poŝtistoj, kiuj en dekoj da jaroj diligente kaj respondeceme servadis al la popolo kaj faris rimarkindajn kontribuojn sur ordinaraj laborpostenoj. Mi decidis preni ilin kiel miajn lernendajn ekzemplojn kaj dediĉi mian junecon al la popola poŝto.

Ĉiu el ni leterportistoj respondecas pri portado de leteroj kaj gazetoj al nombro da stratoj, nome sekcio. Ordinare ĉiu leterportisto konas nur unu sekcion. Sed kiam iuj leterportistoj ripozas, la anstataŭanto devas plenumi ilian laboron, por kio li devas koni plurajn sekciojn. En tiu tempo, rapide kreskis nia laboro, peziĝis nia tasko kaj iuj el la malnovaj laborantoj prizorgis plurajn sekciojn malgraŭ laco. Ĉar mankis al mi sperto kaj mi povis disporti poŝtaĵojn nur al unu sekcio, kaj pro tio mi tre maltrankviliĝis. Sekve do en junio de 1972 mi petis permeson de nia estraro labori kiel anstataŭanto kaj fari pli grandan kontribuon al la leterporta laboro. Pro mia insisto la estraro fine konsentis mian peton.

Nia poŝtoficejo prizorgas entute 23 sekciojn kun 234 stratetoj, kie troviĝas 7,778 pordnumeroj kaj loĝas pli ol sesdek mil familioj. Kaj krome tie troviĝas ankaŭ multaj fabrikoj, oficejoj, butikoj kaj lernejoj. Kiamaniere oni povas bone koni ilin kaj eviti erarojn en disportado de poŝtaĵoj al distrikto tiel komplika? Iuj spertaj kolegoj kuraĝigis min: "Provu multfoje kaj vi bone konos la sekciojn." Mi do vizitis sub ilia gvido sekcion post sekcio. Kelkfoje mi sola plenumis la laboron kaj pro nesufiĉe bona kono pri la sekcioj, mi ne povis fini la disportadon ĝis malfrua horo, kaj tiam malnovaj kolegoj min helpis post plenumo de sia laboro. En la plej komplika sekcio sub la servo de nia poŝtoficejo estas multaj stratetoj interkruciĝantaj kaj disportante poŝtaĵojn en ili oni sentas, ke oni estas kvazaŭ en labirinto. Foje, nia grupestro devis iri tien por kolekti abonpagojn por ĵurnaloj kaj mi interŝanĝis kun li niajn laborojn por ke mi konu tiun sekcion. Kaj poste mi servis al tiu sekcio kiel anstataŭanto en unu tuta semajno kaj sukcesis koni la poŝtan vojon.

Nenio en la mondo malfacilas, se oni nur kuraĝas alten grimpi. Post pena klopodado en unu jaro kaj duono mi finfine akiris bonan konon pri la 23 sekcioj de nia poŝtoficejo kaj nun jam povas plenumi laboron anstataŭ ĉiu ajn kolego.

Ni leterportistoj kontaktas multajn popolanojn en la ĉiutaga laboro kaj profunde sentas iliajn korajn konfidon kaj esperon al ni. Kaj mi kuraĝigadas min nepre servi tutkore al la popolo kaj vere meriti la gloran titolon de popola leterportisto.

En mia leterporta laboro du eraroj estas neforgeseblaj por mi kaj profunde min edukis. Unu eraro estis okazinta nelonge post kiam mi komencis deĵori kiel anstataŭanto. Mi erare portis leteron al institucio kies adreso estas simila al tiu de la letero. La alia estis misdono de ĵurnalo. Foje mi trovis antaŭ findisdono de ĵurnaloj, ke restas al mi superflua ekzemplero de la *Popola Ĵurnalo* kaj mankas al mi unu ekzemplero de la *Pekina Ĵurnalo*. Mi ne povis rememori, kie mi faris la eraron. Mi devis reiri al la trairitaj stratoj kaj demandi familion post familio kaj trovis la misdonitan ĵurnalon post demandado al dekoj da familioj. Post tio mi malkovris la kaŭzon de tiuj eraroj sub varma helpo de miaj kamaradoj, nome neglektemon. Resumante la sperton mi komprenis, ke mi devas havi altan respondecemon kaj tre seriozan sintenon en laboro por senĉese altigi la kvaliton de mia servo. De tiam mi estas pli rigora al mi mem kaj laboras serioze kun penemo. Ĝis nun mi jam disportis pli ol milionon da leteroj, gazetoj kaj ĵurnaloj kaj neniu alia eraro okazis.

En lernado de avangardaj laborantoj por tutkore servi al la popolo, mi kaj aliaj junuloj de nia grupo kune organizis grupeton por disporti malklare adresitajn poŝtaĵojn en postlaboraj horoj. Foje ni ricevis leteron adresitan al loĝanto ĉe n-ro 1 de Nanluogu-strato. Sed la adresato ne troviĝis en la dirita domo. Ni pridemandis la loĝantojn de n-ro 1 de ĉiuj 8 stratetoj de la nomita strato, sed ne trovis lin. Poste ni petis helpon de policejo. Kamaradoj policanoj entuziasme helpis nin traserĉi la kartojn pri la loĝantoj de tiu distrikto, sed ne trovis la adresaton. Finfine sub la helpo de la urba policejo ni trovis la adresaton jam transloĝiĝintan. Sole en la unua duonjaro de 1975 ni jam sukcesis liveri pli ol 200 malklare adresitajn leterojn.

La praktiko konigis al mi, ke por bone plenumi leterportistan laboron oni nepre devas bone koni la opiniojn de la amasoj kaj senĉese plibonigi sian laboron. Ekzemple en iu periodo mi portadis ĵurnalojn al iu fabriko ĉiufoje je unu horo post la deĵortempo. Laboristoj grumblis, ke ili povas nur legi lastatagan ĵurnalon, kaj postulis, ke mi plibonigu mian laboron. Tiu fabriko troviĝas je la fino de la sekcio, tial mi portis la poŝtaĵojn je pli ol unu horo pli malfrue ol la komenco, mi do ŝanĝis de tiam la vicon kaj unue portas poŝtaĵojn al la fabriko kaj poste tiujn al la ordinaraj loĝantoj, tiel ke ambaŭ la loĝantoj kaj la laboristoj povas ĝustatempe legi ĵurnalojn.

Ĝuste en la jaroj post mia suriro sur laborpostenon la popolo de nia lando sub la gvido de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio faris profundan kritikadon al la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Lin Biaŭ. Tiu batalo altigis mian konscion pri la klasbatalo kaj la batalo inter la du linioj kaj komprenigis al mi, ke mi povos bone fari la laboron, nur se mi rigore postulos al mi kaj batalados kontraŭ ĉiaj eraraj pensoj kaj agoj. En certa tempo iuj pledis por "laborhora instigo", t.e. oni povas laŭvole uzi la horojn post finplenumo de sia tasko. Ili opiniis, ke tia aranĝo povas "aktivigi" la laborantojn. Mi opiniis, ke tio estas manifesto de influo de la reviziisma linio. Per "materia" kaj "laborhora" instigo anstataŭ meto de politiko de la proletaro kaj ideologia edukado sur la unua loko oni povas nur instigi burĝan egoismon, sed ne aktivecon por konstrui socialismon. Mi pensis, ke mi ne devas subteni tian eraran praktikon. Sed kiamaniere oponi kontraŭ tio? Plej elokventa estas praktika ago. Mi do kolektis abonpagojn en matenaj kaj vesperaj horoj, kiam la abonantoj kutime estis hejme kaj tiamaniere en du tagoj mi jam plenumis la tritagan taskon. En la elŝparita tago mi deĵoris laŭkutime kiel anstataŭanto por disporti poŝtaĵojn. Nemalmultaj junaj leterportistoj sekvis mian ekzemplon kaj tiel ĉesigis la eraran faron. Iuj diris, ke mi estas iom "stulta", sed mi opinias, ke tia kvalito estas bezonata por fari revolucion. Mi ne timos malfacilojn, batalos kuraĝe kaj rezolute plenumos la taskojn al mi donitajn de la Partio kaj la popolo.

BAJ ŜAN:

# PRINTEMPAJ PLANTIDOJ

## —pri la kolora rakontfilmo

EN la vasta kamparo de la nuna Ĉinio ofte vidiĝas tiaj gejunuloj, kiuj surkampe aktive laboras donante modelan ekzemplon, post fizika laboro vizitas de domo al domo malsanajn komunumanojn por doni al ili medicinan helpon, kaj eĉ en ventopluva profunda nokto, se iu frapis je la pordo por peti kuracon, tuj rapidas al la malsanulo kunportante medikamentan keston kaj lanternon, kiom ajn longa estas la distanco. . . Ili estas nudpiedaj kuracistoj — nova socialisma afero aperinta en la Granda Proleta Kultura Revolucio.

En la lasta jaro ĉinaj filmistoj surekranigis la novan aferon kaj nomis la filmon *Ĉunmiaŭ* (ĉine: printempa plantido) laŭ la nomo de la heroino en la filmo Tian Ĉunmiaŭ. La filmistoj rigardas la ĉinajn nudpiedajn kuracistojn kiel fortikajn printempajn plantidojn, kiuj elkreskis en printempa pluvo kaj simbolas la fortan vivipovon de la novaj aferoj. La filmo entuziasme prikantas la grandan venkon de la kultura revolucio.

Per la kontraŭdiroj kaj konfliktoj inter nudpieda kuracistino Tian Ĉunmiaŭ kaj enpartia potencteninanto iranta la kapitalisman vojon Du Vengie (membro de la partia komitato de la komunumo kaj estro de la komunuma hospitalo), kaj kuracisto Kian Gijen (kontraŭrevoluciulo), la filmo *Ĉunmiaŭ* rakontas kiel la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj faras akran batalon kontraŭ la reviziisma higiena linio de Liu Ŝaŭki por plenumi la revolucian higienan linion de Prezidanto Maŭ kaj ŝanĝi la staton de la kamparo kie mankas medicina servo.

En suda Ĉinio, kie la kampoj verdas kun agrikulturaj plantidoj bone kreskantaj, komunumanoj de Hubin-brigado gaje laboras surkampe. Hiaŭmej, filineto de malriĉkamparanino Bofratino Afang subite falis en malsanon. Estrino de la brigadaj virinaj aferoj Ĉunmiaŭ kaj Bofratino Afang tutforte remas boaton por sendi Hiaŭmej al la komunuma hospitalo. Sed la hospitalo gvidata de Du Vengie neniom zorgas pri la sano de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En la ĉambro por urĝa kuraco Hiaŭmej estas en vivdanĝero, Ĉunmiaŭ kaj Bofratino Afang ege maltrankvile atendas kuraciston. En alia ĉambro kuracisto Kian Gijen trankvile observas blankajn musojn en kaĝoj. Kvankam oni plurfoje atentigis lin, ke infano suferanta de grava malsano atendas lin, tamen li restas apatia. Tiel la filineto de la malriĉkamparanino mortis en la ĉambro por urĝa kuraco.

Estis nature, ke tia afero okazis en la malnova Ĉinio regata de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo. Sed kial tio ankoraŭ aperis en la 17-a jaro post la fondiĝo de la nova Ĉinio? La klasa batalo en la socialisma historia periodo montrita de la filmo faras klaran respondon pri tio.

Post la Liberiĝo, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj akiris emancipiĝon en politiko kaj multe pliboniĝis ilia vivo. Sed influite de la reviziisma linio antaŭenpuŝata de Liu Ŝaŭki, la regpotenco super la kuracaj kaj higienaj rondoj falis en la manojn de plenmano da enpartiaj potencteninantoj irantaj la kapitalisman vojon, tiel ke la stato de manko de kuracistoj kaj medikamentoj en la kamparo restigita de la malnova socio estis ne radikale ŝanĝita. Du Vengie ĝuste estas tia potencteninanto iranta la kapitalisman vojon. Subtenate de la estro de la gubernia higiena buroo, li uzis grandan monsumon, multajn medikamentojn kaj medicinajn instrumentojn, kiujn

"Ĉunmiaŭ"

la ŝtato asignis al la komunuma hospitalo por servi al la komunumanoj en kuracado kaj preventado de malsanoj, por esplori korposanigan terapion servantan nur al malmultaj homoj, precipe al enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Krome li lasis malbonulon Kian Giĵen doni medikamentojn de la hospitalo al ŝamanino kiu uzas ilin por trompakiri monon. Tamen ili estas apatiaj kontraŭ malsanoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Hubin-brigado ĉagrenas kaj indignas pro la morto de Hiaŭmej, la sekretario de la brigada partia filio Akiang portas al ili ĝojigan informon: Prezidanto Maŭ elmetis alvokon: **"Meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon."** La alvoko de Prezidanto Maŭ spegulas la fortegan deziron de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. La filmo vivece prezentas ilian ĝojon. Ili decidis elkulturi sian propran kuraciston kaj sendis sian Ĉunmiaŭ al la komunuma hospitalo por lerni medicinon. Kun reakcia politika antaŭflaro Kian Giĵen tuj konsciis, ke "la spaco sub liaj piedoj estos okupata de aliuloj", se oni lasos tiajn "nudpiedulojn" kiel Ĉunmiaŭ posedi medicinan arton. Tial en komploto kun la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon Du Vengie, li ĉiamaniere malhelpis kaj kontraŭis ŝin. Ili donis al Ĉunmiaŭ servistinan laboron, ordonis ke ŝi lavu amasojn da flakonoj, littukoj kaj litkovriloj. Iliaj turmentado kaj diskriminacio al Ĉunmiaŭ indignigis junan kuraciston Fang Ming kaj flegistinon Tang. La lastaj entuziasme instruas al Ĉunmiaŭ akupunkturon kaj kuracarton en postdeĵoraj horoj. Por okupi la kuracan pozicion en kamparo, Ĉunmiaŭ obstine lernas kaj ripetade sin ekzercas en akupunkturado sur sia korpo.

Iutage, maljuna malriĉkamparano Onklo Ŝujĉang enakviĝis por savi ŝipon da rizo, kio kaŭzis reaperon de lia malnova lumbodoloro, kaj pro tio li venis al la hospitalo. Kian Giĵen ne volas lin kuraci, opiniante ke la malsano estas nekuracebla. Vidinte tion Ĉunmiaŭ sentas akran doloron en la koro, kaj kun profunda proleta amo ŝi faras al Onklo Ŝujĉang akupunkturon. La ago de Ĉunmiaŭ rompis la hospitalan regularon kaj kaŭzis akran konflikton, ĉar sen kuracista diplomo oni estas malpermesitaj fari kuracon al paciento. Kian Giĵen insultas, ke

*Aŭdinte la kortuŝajn vortojn de la sekretario de la brigada partifilio "Prezidanto Maŭ subtenas nin!" Ĉunmiaŭ eklarmas de ekscitiĝo.*



Ĉunmiaŭ ne taŭgas por lerni medicinon simile al tio, ke argila pelvo ne taŭgas por gravuri delikatajn desegnojn. Du Vengie ekkoleregas kaj kriegas, ke la manoj de Ĉunmiaŭ taŭgas nur por preni ŝpaton, sed ne injektilon. Ĉunmiaŭ rezolute respondas, ke ĝuste tiaj manoj de miloj kaj dekmiloj da laboruloj renversis la regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo kaj faris batalon por reformi la naturon, kaj tiaj manoj povas ankaŭ bone manipuli injektilon. La aktuala klasbatalo komprenigis al Ĉunmiaŭ, ke tiel granda malhelpo al ŝi kaj aliaj gejunuloj en lernado de medicino devenas de tio, ke post Kian Gijen staras Du Vengie. El tio ŝi konkludas ke la sinjora hospitalo neniel volas lasi nudpiedulojn fariĝi kuracistoj, ŝi rezolute forlasis la hospitalon kaj revenis al sia brigado.

Subtenate de la brigada partia filio kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj helpate de kuracisto Fang, Ĉunmiaŭ starigis kuracejon en Hubin-brigado kaj fervore servas al la amasoj per akupunkturo kaj drogherboj. Por savi la vivon de infano el danĝero, Ĉunmiaŭ faris preskribon. Kun tio oni iris al la hospitalo por aĉeti medikamentojn, sed Du Vengie, kiu nominale estas komunisto, efektive potenctenanto de la hospitalo reprezentanta la burĝaron, faris du "X" sur la preskribo, dirante ke Ĉunmiaŭ ne havas rajton preskribi kaj malpermesas vendi la medikamentojn. Male Du subtenas ŝamaninon trompakiri monon, dirante ke ŝi posedas "hereditan kuracarton" kun "aparta efiko", kaj ordonas ke Kian Gijen donu al ŝi medikamentojn de la hospitalo. Kiam ili aŭdis ke Ĉunmiaŭ starigis kuracejon, tion ili malamas ĝisoste. Du Vengie opinias ke tio estas opono kontraŭ li, kaj montrante la "regulojn kaj difinojn de la supera instanco" li nuligis la kuracejon, pretekstante ke ŝi faras kontraŭleĝan kuracon. Li ankoraŭ minacas Ĉunmiaŭ, ke se ŝi ne obeas lian ordonon, tio signifas oponadon kontraŭ la Partio, kaj li nuligos ŝian partianecon. Ĝuste en tiu tempo, iu venas por peti Ĉunmiaŭ al kuraco, kaj Du Vengie arbitre deprenas la medikamentan keston de Ĉunmiaŭ. Ŝi komprenas ke tio signifas ke Du Vengie deprenis la rajton de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj entrepreni kuracan aferon sub la gvido de la Partio kaj signifas diktaturon de la bienularo kaj burĝaro super ili. Kiom deziregas ŝi kaj la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj alvenon de revolucia ŝtormo por forblovi la reviziisman higienan linion, kiu suferigas la laborulojn!

Kun revolucia emocio la filmistoj pozitive prezentas la Grandan Proletan Kulturan Revolucion persone iniciatitan kaj gvidatan de Prezidanto Maŭ unuafoje en rakonta filmo. Je tio la konflikto de la filmo eniras kulminon. Ĉunmiaŭ faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ Du kaj Kian. Ŝi serioze lernas la dokumenton persone faritan de Prezidanto Maŭ pri la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj iom post iom havas pli profundan komprenon kaj konon pri la signifo kaj karaktero de tiu movado. Ŝi havas firman starpunkton kaj estas brava kaj obstina en la batalo. En la "trejna kurso de nudpiedaj kuracistoj" starigita de Du Vengie kun kaŝita celo, ŝi kaj ŝiaj kolegoj faras vid-al-vidan batalon kontraŭ Du kaj Kian. Ŝi malkaŝas ilian intrigon starigi la trejnan kurson, doni al la nudpiedaj kuracistoj po medikamentan keston, laborveston, stetoskopon, subvencion, promesi senekzamenan enuniversitatiĝon ktp, montrante ke ĉio ĉi tio estas korupto kaj celas konfuzi la amasojn por estingi la flamon de la kultura revolucio kaj ŝanĝi la direkton de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj aliaj revoluciaj amasoj en la batalo kontraŭ ili. Ĉunmiaŭ kaj aliaj nudpiedaj kuracistoj faras revolucian kritikon kontraŭ la reviziisma higiena linio plenumata de Du Vengie, montrante ke li vanigis la esperon de la Partio kaj la popolo al li, kapitulacis al la burĝaro kaj fariĝis ĝia agento en la Partio.

Gvidate de Ĉunmiaŭ kaj kuracisto Fang, la revoluciaj kuracaj laborantoj rompis la katenon de "rutinaj reguloj" de la hospitalo speciale por diskriminacii la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. Ili invitas Onklon Ŝujĉang elpuŝitan de Du kaj Kian en la hospitalon, starigas kuracan grupon de lumba kaj gamba malsano kaj lin kuracas per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino. Ĉunmiaŭ trinkigis al Onklo Ŝujĉang drongherban dekoktajon



*Malriĉkamparano Onklo Ŝujĉang subtenas Ĉunmiaŭ en batalo kontraŭ la reviziisma linio de la komunuma hospitalo.*

preparitan laŭ la speciala popola recepto por kuraci lumban kaj gamban malsanon, kiu estis proponita de maljuna drogherbokolektisto Avo Ŝi al la hospitalo kaj longtempe flankenmetita de Du kaj Kian. La dekoktaĵo havis pozitivan efikon en Onklo Ŝujĉang. Du Vengie falinta en reviziisman ŝlimon ne nur ne akceptas la kritikon faritan de la revoluciaj amasoj, sed male faras frenezan rebaton. Li kaj Kian Giĵen ĉie kalumnias ke la malsano de Onklo Ŝujĉang pli graviĝis pro trinko de la dekoktaĵo preparita de Ĉunmiaŭ. Por radikale resanigi la lumbon de Onklo Ŝujĉang kaj malkaŝi la kalumnion de Du Vengie kaj Kian Giĵen, Ĉunmiaŭ vizitas Avon Ŝi. Instigate de li kaj konsiderante la longan malsanan historion de Onklo Ŝujĉang, ŝi decidas pli grandigi la dozon. Ŝi persone prove trinkas bovlon da dektokaĵo kies veneno superas preskaŭ duoblon de la limigita kvanto. Post intensa reakcio Ĉunmiaŭ reakiras sian bonfartecon. La eksperimentado sukcesis. Sed kiam la dekoktaĵo riske provita de Ĉunmiaŭ ankoraŭ ne atingis Onklon Ŝujĉang, ĝi jam estas batita de Du Vengie teren. Kalumnie pretekstante ke Ĉunmiaŭ faris "kuracan akcidenton", li intencas veturigi Onklon Ŝujĉang al la gubernia hospitalo por urĝa savo kaj per tio disigi la kuracan grupon. Kaptante la ŝancon, Kian Giĵen donas al flegistino injektaĵon kun enmiksita veneno uzotan al Onklo Ŝujĉang. Per tio li intencas mortigi la lastan kaj atribui la krimon al Ĉunmiaŭ. Ĉunmiaŭ, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝustatempe travidas la intrigon de Kian Giĵen kaj finfine malkaŝas tiun kontraŭrevoluciulon. Antaŭ la solidaj faktoj, Du Vengie vole-nevole mallevas sian kapon.

La en la batalo rapide maturiĝanta Ĉunmiaŭ konscias: Tiu batalo ne nur koncernas la demandon, kiel oni devas kuraci malsanon de malriĉkamparano, sed ankaŭ estas batalo de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por depreni la higienan gvidantecon de enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. La venko de la batalo kontraŭ Du Vengie estas venko de la revolucia higiena linio de Prezidanto Maŭ. Kun profunda amo Ĉunmiaŭ prezentas al Onklo Ŝujĉang alian bovlon da dekoktaĵo. Per ambaŭ manoj tiu maljuna malriĉkamparano prenas ĝin kaj eltrinkas en unu spiro. Li emocie krias laŭte: "Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!"

La sudĉinia kamparo kun verdaj bambuoj en sunbrilo milde varma prezentas serenan kaj freŝan pejzaĝon. Kunportante medikamentan keston, Ĉunmiaŭ iras en la suno al rondira kuracado. . .




# "La Longa Marŝo"

## (Skulptaĵoj)

SUR la 3-a paĝo de la kovrilo de ĉi numero ni prezentis grupon da grandaj skulptaĵoj el Ŝoŭŝan-ŝtono "La Longa Marŝo". Ĝi estas kreita de la laboristoj de la Fuĝoŭ-a Fabriko de Skulptaĵoj de Fugian-provinco por memorigi la 40-an datrevenon de la venko de la Longa Marŝo fare de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo.

La skulptaĵo-grupo konsistanta el la ses partoj "Zunji", "Sagaca Transpaso de Ginŝa-rivero", "Fulmrapida Kapto de Luding-ponto", "Transgrimpo de la Neĝa Monto", "Konkero de Lazikoŭ-pasejo" kaj "Janan" estas farita el Ŝoŭŝan-ŝtono de Fugian kaj kombinita per revolucia realismo kaj revolucia romantiko. Ĝi montris kortuŝajn scenojn de la Longa Marŝo fare de la Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo sub la gvido de Prezidanto Maŭ.

Ŝoŭŝan-ŝtono kun subtileco kaj brileco estas riĉa je naturaj koloroj. Kiel unu el la elstaraj tradiciaj metiartoj de Ĉinio, la ŝtona skulptado de Ŝoŭŝan havas historion de pli ol mil jaroj kaj jam formis apartan stilon en tekniko. Antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, sub la influo de la reviziisma literatura kaj arta linio de Liu Ŝaŭki, multe da skulptaĵoj el Ŝoŭŝan-ŝtono estis dioj, budhoj kaj strangaj bestoj. En la kultura revolucio la metiartistoj kritikis tiun kontraŭrevolucian reviziisman linion, ĝustigis al si la direkton servigi metiarton al la proleta politiko kaj kreis nemalmultajn novajn verkojn kun revolucia enhavo, kiuj estas laŭdataj de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La skulptaĵo-grupo "La Longa Marŝo" estas unu el ili.

Kiam la laboristoj komencis krei tiun verkon, ili renkontis jenan problemon: Dum longa tempo oni skulptis el Ŝoŭŝan-ŝtono ĉefe unuopan verkon, kiel do oni povas speguli revolucian historian temon pri la Longa Marŝo kun forta politika ideo kaj vastaj scenoj? La aŭtoroj rompis rutinojn kaj prenis la formon de grupa skulptado malofte uzatan en la historio de la Ŝoŭŝan-ŝtona skulptado. En la projektado ili serioze studis la grandiozan poemon de Prezidanto Maŭ "La Longa Marŝo" kaj estis multe edifitaj kaj kuraĝigitaj. Ili ankaŭ iris al lokoj, kiujn trapasis la Ruĝa Armeo dum sia Longa Marŝo, por fari esploradon, skizon kaj vizitadon al antaŭaj ruĝarmeanoj kaj ruĝgvardianoj. Dank' al tio ili ne nur riĉigis sian vivsperton, sed ankaŭ pli profunde komprenis la signifon de kreado de la verko.

Kiam la Ruĝa Armeo atingis Zunji de Gujĝoŭ-provinco en la Longa Marŝo, ĝi okazigis tie konferencon kun granda historia signifo. En la skulptaĵo "Zunji" la aŭtoroj prezentis la imponan kunvenejon kun originala kaj signifoplena aranĝo de la detalaĵoj. La verko montras, ke venke fermiĝis Zunji-konferenco, trupoj komencis kolektiĝi kaj soldatoj kun alta batalvolo estas pretaj por ekmarŝi. La aŭtoroj ankaŭ saĝe projektis pinarbaron kaj umeflorojn antaŭ la kunvenejo. La pinoj simbolas senmortecon de la spirito de la konferenco; kaj la umefloroj ne timantaj froston kaj anoncantaj printempon, montras kaj la tempon de okaziĝo de la konferenco kaj la forpason de frosta vintro kaj la baldaŭan venon de printempo. En politiko tio signifas, ke jam finiĝis la regado de la "maldekstra" oportunisma linio de Vang Ming en la Partio, estis starigita la gvida pozicio de Prezidanto Maŭ en la tuta Partio kaj la tuta armeo kaj de tiam la ĉina revolucio iros de venko al venko. Dum kreado de la skulptaĵo "Fulmrapida Kapto de Luding-ponto" la aŭtoroj versimile bildigis ferĉenojn de la ponto kaj krutajn rokmurojn ambaŭborde de Dadu-rivero kaj elstarigis la lokon, kie Prezidanto Maŭ akceptis reprezentantojn de la lokanoj sur la okcidenta bordo antaŭ transpaso de la rivero, kio profunde montris zorgon de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio al la popolamasoj. Por efike prezenti la batalan scenon, ke la ruĝarmeanoj trapasas la ponton spite al densa pafado de la malamikoj, la aŭtoroj intence longigis la ponton kaj malaltigis la malproksimajn montojn kaj tiamaniere elstarigis la heroajn figurojn de la ruĝarmeanoj.

Dum kreado de la verko la metiartistoj ne nur novigis teknikon de skulptado, sed ankaŭ kombine aplikis plurajn teknikojn por prezenti unu temon laŭ la bezono de enhavo de la verko. En la projektado de la sceno ili lerte utiligis la kolorojn kaj formojn de Ŝoŭŝan-ŝtono. En

la skulptajo "Transgrimpo de la Neĝa Monto" la aŭtoroj prenis blankajn partojn de la ŝtono por montri la montpintojn plenkovratajn de neĝo kaj glacio kaj ruĝajn kaj flavajn partojn por skulpti ruĝajn flagojn kaj armeon. La verko kun ruĝo kaj blanko en kontrasto prezentis varman atmosferon kaj elstarigis la ĉefan enhavon.

La verko estas projektita de grupo konsistanta el laboristoj, projektistoj kaj kadroj kaj farita de maljunaj, mezaĝaj kaj junaj metiartistoj. Ili ĉiuj klopodis ĉiamaniere per sia lerta tekniko por kontribui al la verkado. En la pasinteco oni lertis nur en skulptado de pejzaĝo, floroj kaj bestoj, sed malmulte skulptis homojn. Tamen en la verko ne nur estas montoj, akvoj kaj arboj sed ankaŭ 191 homoj. La veteranaj metiartistoj, kiuj lertas en skulptado de montoj, akvoj kaj floroj, kaj la junaj laboristoj, kiuj lertas en skulptado de modernaj homoj, en strikta kunlaboro venke plenumis tiun kreadon per komuna saĝo kaj forto.

Dum la kreado de la verko la aŭtoroj ofte petis opiniojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Laŭ la opinio de iu veterana ruĝarmeano oni ŝanĝis la scenon de venka kuniĝo de la Ruĝa Armeo en Jan-an en la peco "Jan-an" en la nunan: Sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo triumfe finis la Longan Marŝon kaj la popolo de Jan-an ĝoje tamtamas kaj tamburas por bonvenigi siajn karulojn en celebrado de la venko. Tio montras la volon de la armeo kaj popolo unuiĝi por batali kontraŭ japanaj agresantoj kaj savi la patrolandon kaj la komencon de nova situacio post la finiĝo de la Longa Marŝo.




# Tajlanda ensemblo en Ĉinio

En la ĉarma sunplena aprilo la ĉina popolo ĝoje akceptis amikajn senditojn de la najbara tajlanda popolo — la Ensemblon de la Arta Departemento de la Eduka Ministerio de Tajlando.

Antaŭ pli ol du mil jaroj jam komenciĝis la amika kontakto inter la popoloj de Ĉinio kaj Tajlando. En la sekvanta longa historia periodo senditoj de la du landoj senĉese intervizitis kaj sufiĉe vigla estis la interŝanĝo de ekonomio kaj kulturo de la du popoloj. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, pro malhelpo kaj subfosado fare de imperiistoj iam rompiĝis la amika rilato inter ambaŭ landoj. En la lastaj jaroj, precipe post la establiĝo de diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Tajlando, restariĝis kaj disvolviĝis la tradicia amikeco de la du landoj kaj ĉiam pli oftiĝas vizitoj inter la du registaroj kaj la du popoloj. La vizito



de la tajlanda ensemblo al Ĉinio enskribis novan paĝon en la historio de la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Tajlando.

Por esprimi sian amikecon al la ĉina popolo la artistoj de la ensemblo speciale kreis novan dancon "Amikeco inter Tajlando kaj Ĉinio". Aktorinoj gracie dancis en tajlanda kaj ĉina kostumoj, tenante florojn en la manoj, simbolante ke la tradicia amikeco inter la du popoloj prosperas kiel pompaj floroj. Ĝuste kiel kantoteksto diras, la amikeco inter Tajlando kaj Ĉinio estas profunda kaj eterna, kaj ilia rilato tiel intima kiel tiu inter fratoj.

La ensemblo prezentis en Ĉinio krom klasikaj dancoj ankaŭ popolajn dancojn spegulantajn la laboradon kaj vivon de la tajlanda popolo kaj akrobataĵojn montrantajn ĝian nacian spiriton. Tiuj programeroj montris de malsamaj flankoj la laboremon, bravecon kaj saĝecon de la tajlanda popolo.

# Junaj muzikistoj de Japanio vizitis Ĉinion



*Interparolado de ĉinaj kaj japanaj artistoj*

En marto ĉijare la Blovinstrumenta Orkestro de Nagoja Elektroindustria Altlernejo de Japanio veturis laŭ invito al Ĉinio por fari amikan viziton kaj prezentadon en Pekino kaj Ŝanhajo. Kiel la unuaj amikaj senditoj de junaj muzikistoj de Japanio ili esprimis per muziko la amikecon de la du popoloj kaj faris novan kontribuon en disvolvado de la kultura interŝanĝo de la du popoloj.

Tiu orkestro estas amatora arta grupo. Por disvolvi sian nacian muzikon la instruistoj kaj studentoj de la lernejo kolektas sanajn popolkantojn kaj infankantojn en la japana popolo kaj klopodas por kolekti kaj prezenti la muzikajn verkojn riĉajn je batala spirito, kiun montras la japana popolo en la justa kontraŭhegemoniisma batalo por repreni la nordajn teritoriojn.

Dum sia vizitado al Ĉinio ili ludis enhavoriĉajn kaj diversformajn popolkantojn, infankantojn, marŝojn, ariojn k.a. La "Kanto pri Repreno de la Nordaj Teritorioj" bone esprimas la decidemon de la japana popolo en batalo kontraŭ entrudiĝintaj eksteraj fortoj. La emocia indigna melodio vekis ĉe la ĉinaj aŭskultantoj fortan eĥon kaj ricevis ilian tondran aplaŭdon, kiu manifestis firman subtenon de la ĉina popolo al la justa batalo de la japana popolo. Pli intima por la ĉinaj spektantoj estas la ludo de ĉinaj muzikoj kaj muzikaj verkoj, kiuj prikantas la eternan amikecon de la popoloj de Ĉinio kaj Japanio.

En la libera tempo inter prezentadoj la japanaj amikoj havis ĝojajn renkontiĝojn kun ĉinaj laboristoj, lernantoj, literaturaj kaj artaj laborantoj kaj faris vizitojn al pitoreskejoj kaj institucioj.


# Aŭskultu al la esperanta disaŭdigo de Radio Pekino

**Por Eŭropo**

**Pekina Tempo**

Sabato k Dimanĉo

4:00—4:30

**GMT**

Vendredo k Sabato

20:00—20:30

**Ondoj(m)**

47 43 31 25

**Por Japanio, Koreio**

**Pekina Tempo**

Sabato k Dimanĉo

19:00—19:30

**Ondoj(m)**

40 30

**Por Sudorienta Azio**

**Pekina Tempo**

Sabato k Dimanĉo

20:30—21:00

**Ondoj(m)**

30 25 19




# La ĉjang-oj

de ZONG MIN

LA ĉjang-nacieco estas unu el la plej maljunaj naciecoj. Antaŭ pli ol 3,000 jaroj la ĉjang-oj jam nomadis en la okcidenta parto de Ĉinio. La ĉjang-oj en antikveco ne estis membroj de la unika nacieco, sed ĝenerala nomo por ĉiuj nomadaj triboj. Laŭ la historiaj notoj, ekde Kin- kaj Han-dinastioj la praavoj de tiu nacieco jam loĝis en la loko de la nuna nordokcidenta Siĉuan-provinco. Poste iuj el la ĉjang-oj iom post iom asimiliĝis kun tibetanoj kaj aliaj kun hanoj, kaj nur malgranda nombro el ili vivis aparte kaj evoluis iom post iom en la hodiaŭan ĉjang-naciecon.

La nunaj ĉjang-oj nombras pli ol 43,000, kiuj dislokiĝas ĉefe en la supra parto de Mingiang-rivero de Siĉuan-provinco. Pli ol 26,000 el ili loĝas en la Maŭven-a Ĉjang-nacieca Aŭtonoma Gubernio kaj la ceteraj en Venĉuan-gubernio najbare de Maŭven.

En la regiono loĝata de ĉjang-oj estas multaj pitoreskaj montoj kaj riveroj kaj kreskas tie densaj praarbaroj. La branĉaj montoj Giuding kaj Ĝegu de Min-montaro etendiĝas tra la tuta regiono. Giuding-monto altas je pli ol 4,200 metroj kaj estas ĉiam kovrata de neĝo. Mingiang-rivero trafluas de la nordo suden la tutan aŭtonoman gubernion kaj liveras tre abundajn akvofortojn.

La regiono de ĉjang-nacieco estas tre riĉa je produktajoj. Tie oni kulturas ĉefe maizon, kaj cetere sekalon, tritikon, fagopiron, fabacojn, legomojn k.s. Krome tie oni kulturas ankaŭ kajenan piprarbedon, nuksarbon, tearbon, lakarbon kaj pomarbon. Ĝia kajena pipro estas fame konata pro sia granda produktokvanto kaj bona kvalito. La banan-gustaj pomoj de Maŭven karakteriziĝas per aparta bonodoro kaj dolĉeco. Precipe la ruĝaj Hongjuanŝuaj-pomoj estas plej bongustaj, kiuj ricevis multan laŭdon en la Tutlanda Ĝardenistika Kunveno okazigita en Kantono.

En la gubernioj Maŭven kaj Venĉuan oni multe produktas ankaŭ ursan galvezikon, moskon, cervan junkornon, fritilarion, vegetalan raŭpon kaj aliajn valorajn ĉinmedicinajn drogojn. La animaloj pando kaj orhara simio raraj en la mondo ja vivas en tiu loko.

La ĉjang-oj havas intiman rilaton kun hanoj en politiko, ekonomio kaj kulturo. Ilia amika kontaktiĝo neniam estis interrompita en la pasintaj miloj da jaroj. Tri jarcentojn a. K. la ĉinaj laboruloj konstruis fame konatan Dugiangjandigon en la supra parto de Mingiang-rivero, en kio partoprenis ankaŭ ĉjang-oj loĝantaj en tiu loko. La ĉjang-oj havas sian parollingvon, sed ne skriblingvon. Ili ĝenerale scipovas la hanan lingvon.

En la longa periodo de la historio, la ĉjang-a popolo kreis kaj akumulis riĉan kaj brilan kulturon. La ordinare tri-etaĝa fuortoforma domo de tiu nacieco konstruita per senregulaj ŝtonoj estas fortika. En la komenco tiaj domoj estis uzataj por defendo kaj poste fariĝis iliaj karakterizaj loĝdomoj. Iuj fuortodomoj el pluraj etaĝoj altas pli ol 30 metrojn kaj aspektas tre grandiozaj. La ĉjang-oj konstruis tiajn domojn nur per okulmezurado, sed ne liniiloj kaj mekanikajoj, tamen la domanguloj estas tre rektaj. Tiaj domoj ne disfalos eĉ post centoj da jaroj. La arkitekturo plene montris la laboremon kaj saĝon de la ĉjang-a popolo. Ankaŭ la ponto el bambuaj kabloj de tiu nacieco estas tre fama pro tio, ke ĝi longas ĉ. 100 metrojn, tamen konsistas nur el pluraj bambuaj kabloj kun bonorde sternitaj tabuloj sen najloj kaj pilieroj.

La ĉjang-oj emas kanti kaj danci. En festotagoj kaj en tempoj post laboro oni ŝatas danci en kanto. La nacieco havas apartan antikvan muzikilon nomatan ĉjang-fluto, kiu ofte estis menciita en poemoj de antikvaj poetoj. Tian fluton oni faras per du bambuaj tubetoj samgrandaj kun longeco de duonfuto, sur ĉiu el la du tubetoj troviĝas 6 truetoj kaj unu bambua anĉo ĉe la supra ekstremo. Oni sonigas ĝin per enspiro tra la nazo. Ĝia agrabla aparta tembro ekstazas aŭskultantojn.

Antaŭ la Liberiĝo, la ĉjang-a popolo same kiel alinaciecaj popoloj falis en kruelan subpremadon kaj ekspluatadon fare de la reakciaj regantaj klasoj kaj vivis mizere pro manko de manĝajoj kaj vestoj. En la jaro 1935, kiam la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio marŝante norden por rezisti la japanan agreson trairis tiun lokon, nemalmultaj ĉjang-naciecaj eminentaj junuloj aliĝis al la armeo. Dank' al la eduko de la Partio kaj sub la influo de la re-

volucia penso tie stariĝis la reĝimo de laboristoj kaj kamparanoj kaj samtempe la agrara revolucio estis arde kondukita.

En januaro de 1950, la Ĉina Popola Liberiga Armeo atingis nordan parton de Siĉuan-provinco kaj ekstermis la restantajn fortojn de la trupoj de Ĉiang Kajŝek kaj reakciajn lokajn armitajn fortojn. Ĝuste tiam ĉjang-regiono estis liberigita.

Sub la saĝa gvido de la granda gvidanto de ĉiuj naciecoj Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio de Ĉinio, la liberigitaj ĉjang-oj ekstermis restantajn banditojn kaj spionojn, disvolvis produktadon kaj starigis demokratian reĝimon. En la periodo de 1954 ĝis 1956 oni faris la potencan Agraran Reformon kaj tiel ĝisfunde abolis la feŭdan ekspluatan sistemon de la ĉjang-nacieca socio. En 1958, laŭ la politiko de la Partio pri nacia regiona aŭtonomeco, fondiĝis la Maŭven-a Ĉjang-nacieca Aŭtonoma Gubernio. Ĉjang-oj diris kortuŝite: "Antaŭe la reakcia Kuomintango neniam agnoskis nian naciecon; sed hodiaŭ, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio ni ektenis regpotencon."

La socialisma vojo por la ĉjang-a popolo estas la vojo al feliĉo kaj prospero. Post la Agrara Reformo la popolo de tiu nacieco starigis unue agrikulturan kooperativon kaj poste popolan komunumon. Precipe en la Granda Proleta Kultura Revolucio, dank' al kritikado kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj liaj sekvantoj tiu regiono progresis multe pli rapide.

Antaŭ la Liberiĝo troviĝis en tiu regiono nenia moderna industrio, eĉ ordinaraj feraj instrumentoj estis liverataj de aliaj lokoj. Iliaj agrikulturiloj estis nur plugiloj, ŝpatetoj k.s. Pro manko de sterko kaj serioza erozio, la produktokvanto de greno estis malalta kaj ne sufiĉis por la popolo. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la ĉjang-oj fariĝis mastroj de la ŝtato. Sub la gvido de la Partio ili suriris la vojon de kolektivigo kaj laboras entuziasme. Dank' al multa helpo de la ŝtato la produktokvanto de greno grandmezure kreskis jaron post jaro. La totala produktokvanto de greno de Maŭven en 1961 4-obliĝis kompare kun tiu en 1949. La grena produktokvanto de 1973 pliiĝis 34.2% kompare kun tiu de 1965 antaŭ la Proleta Kultura Revolucio. La greno produktita de tiu gubernio ne nur sufiĉis por tiea konsumo, sed ankaŭ parte liveriĝis al la ŝtato por subteni la socialisman konstruadon.

Sub la gvido de la partia komitato de la aŭtonoma gubernio la ĉjang-a popolo starigis mezajn kaj malgrandajn fabrikojn, kaj samtempe disvolvis la agrikulturon, forstumon, brutobredadon, neagrikulturajn produktadojn kaj fiŝadon, konstruis multajn akvokonservejojn, pumpstaciojn, mezajn kaj malgrandajn hidroelektrejojn utiligante tieajn riĉajn akvofortojn, kiuj liveras elektron, ne nur al la senĉesa disvolvo de agrikultura produkto, sed ankaŭ al lumigado de multaj vilaĝoj de ĉjang-oj sur altaj montoj, kiuj plu ne uzis pinsemojn por lumigi kiel en pasintaj miloj da jaroj.

En ĉjang-regiono montoj estas altaj kaj valoj profundaj. Antaŭ la Liberiĝo la tiea trafikado estis malfacila kaj ankaŭ la aferoj de kulturo, edukado kaj higieno estis tre mizeraj. Post la Liberiĝo, precipe post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, ĉiuj montvilaĝoj de ĉjang-nacieco ekhavis elementan lernejon, iuj vilaĝoj mezlernejon; medicinaj kaj sanitaraj organizajoj jam dislokiĝas tra la tuta aŭtonoma gubernio, la produktaj brigadoj praktikas kooperan kuracadon. La nove konstruitaj ŝoseoj longas je miloj da kilometroj.

La ĉjang-a popolo kore diris, ke la feliĉa vivo dependas de la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, kaj ke ili ĉiam iros la socialisman vojon.

*Ĉjang-aj virinoj*



HISTORIAJ RAKONTOJ

LJU VEN:

# Sang Hongjang refutis konfucianojn



La anekdoto de la debato inter Sang Hongjang kaj konfucianoj okazis en la jaro 81 a. K. en la Okcidenta Han-dinastio (206 — 8 a. K.). Tio estis debato inter konfucianoj kaj legalizistoj pri politiko, ekonomio, militaj aferoj kaj kulturo, estis batalo por persisti en progreso, defendi la unuiĝon de la ŝtato kaj oponi kontraŭ splitiĝo kaj regreso.

Sang Hongjang (152 — 80 a. K.) estis elstara reprezentanto de la legalizistoj en la Okcidenta Han-dinastio. Li respondecis pri financo de la ŝtato en la regperiodo de la imperiestro Vudi de Han-dinastio, kaj poste li laboris kiel vicĉefministro respondecanta pri juristico kaj prokurora laboro. Dum sia servado en la kortego, li partoprenis en ellaborado de serio da gravaj politikoj kaj aktive ilin plenumis, kaj faris tre grandan kontribuon al firmigado de la unueca feŭda ŝtato de la nove leviĝanta bienula klaso.

En la pli ol cent jaroj de la komenco de stariĝo de la Okcidenta Han-dinastio ĝis la regperiodo de la imperiestro Vudi, la sistemo de centralizisma regado kreita de Imperiestro la Unua de Kin-dinastio estis firmigita, dank' al praktiko de legalizisma linio kiu favoris progreson de la socio. Sed en tiu periodo, intensa batalo ankoraŭ iris inter la konfucianoj, kiuj defendis la interesojn de la dekadenca klaso de sklavmastroj, kaj la legalizistoj, kiuj defendis la interesojn de la nove leviĝanta bienula klaso, kaj inter la fortoj por kaj kontraŭ restaŭro. Tiam la industriaj kaj komercaj sklavmastroj havantaj grandajn ekonomiajn fortojn en komploto kun la princoj monopolis la produktadon kaj komercadon de salo, fero kaj alkoholaĵo kaj superregis la merkaton por profitego. Ili praktikis separatismon en sia regno kaj eĉ koluzie alianciĝis kun hunaj aristokratoj-sklavmastroj norde de Han-imperio por kontraŭstari al la centra regpotenco kaj fari arman ribelon. Vizaĝe al la minaco de la separatismaj fortoj de la princoj kaj la postrestantaj restaŭraj fortoj de la sklavmastroj, la imperiestro Vudi, kiu persistis en la legalizista linio, donis gravan postenon al Sang Hongjang kaj aliaj legalizistoj kaj faris rezolutan batalon kontraŭ tiuj reakciaj fortoj. La ŝtata monopoligo de salo kaj fero estas unu el la gravaj politikoj de financo kaj ekonomio ellaboritaj de la imperiestro Vudi. Praktikado de tiu politiko forte batis la industriajn kaj komercajn sklavmastrojn kaj la separatismajn fortojn de la princoj, plimultigis la enspezon de la ŝtata financo, kaj per tio metis materian bazon por firmigi la sistemon de centralizisma regado kaj rezisti al la hunaj aristokratoj-sklavmastroj. Ĝuste pro tio, la ŝtata monopoligo de salo kaj fero estis plenenergie oponata de la industriaj kaj komercaj sklavmastroj, la separatismaj fortoj de princoj kaj iliaj proparolantoj-konfucianoj.

Post la morto de la imperiestro Vudi, surtroniĝis juna imperiestro Ĝaŭdi. Ĉefministro-Generalo Huo Guang kaptis la regpotencon kaj formiĝis reakcia kliko de konservativaj bienuloj kaj sklavmastraj restaŭraj fortoj kun Huo Guang kiel la ĉefo. Pretekstante prizorgon pri suferoj de la popolo, ili venigis pli ol 60 konfucianojn el diversaj lokoj de la lando kaj okazigis en la ĉefurbo Ĉang-an kunvenon pri salo kaj fero, en kiu ili oponis ĉefe kontraŭ la politiko de ŝtata monopoligo de salo kaj fero. Tio estis surpriza atako komencita je ekonomia problemo kontraŭ la legalizista

linio. Tiam la maljuna Sang Hongjang kun aĝo de pli ol 70 jaroj elokvente refutis la konfucianojn per raciaj argumentoj tiel ke la lastaj forte embarasiĝis ne povante trovi elturniĝon.

Huo Guang ne ĉeestis la kunvenon, sed manovris ĝin post la kulisoj, prenante la konfucianojn kiel siajn proparolantojn. Je la komenco de la kunveno, sin ŝajnigante proparolantoj de la popolo la konfucianoj atakis dirante, ke la ŝtata monopoligo de salo kaj fero estas kontraŭ la principo "alte taksi moralon kaj malalte profiton, alte taksi justecon kaj malalte monon", kaj ke tio signifas konkuri kun la popolo en kapto de profito kaj ne utilas al la agrikulturo. Ili postulis "ĉesigi la monopoligon de salo kaj fero kaj redoni la rajtojn".

Sang Hongjang malkaŝis ilian hipokritecon, ke pretekstante prizorgon al la popolo ili efektive klopodas por restaŭro de la industriaj kaj komercaj sklavmastroj kaj la separatismaj fortoj de la princoj. Li demandis al ili, kiu el la popolo povas tirane proprigi montojn kaj lagojn kaj produkti feron kaj salon? Kiu povas starigi farejon de alkoholaĵo kaj vendi ĝin je alta prezo? Nur la princoj povas tirane regi parton de la lando, riĉiĝi per produktado de salo, muldi monerojn kontraŭleĝe kaj eĉ komploti unu kun alia por arma ribelo. Tial "ĉesigi la monopoligon de salo kaj fero kaj redoni la rajtojn" signifas permesi privatan produktadon de salo kaj fero, kio favoras nur la princojn en sinapartigo de la lando, malfortigas la centralizitan regpotencon, splitos la regnon kaj pelos la popolon en abismon de suferoj. Ĉu ne estis klare, ke por kiuj ili parolis kaj argumentis? Sang Hongjang persistis en la legalizista opinio pri sufiĉa atento al disvolvado de agrikulturo kaj ĝin disvolvis, refutis la absurdan aserton de konfucianoj, ke nur "ĉesigi la monopoligon de salo kaj fero" povas "ĝenerale favori agrikulturon", kaj montris, ke en administrado de la ŝtato oni devas disvolvi samtempe agrikulturon, industrion kaj komercon.

En la kunveno la konfucianoj ankaŭ distrumpetis la absurdajon "alte taksi moralon kaj neglekti militon" kaj atakis la dispoziciojn de la imperiestro Vudi por rezisti kontraŭ la invado de hunoj. Ili akcentis malarmadon, proponis omaĝi al la hunoj per donaco de teritorio kaj parenciĝi kun ili por paciĝo.

Sang Hongjang akre riproĉis la konfucianojn pro ilia naciperfida kapitulaca ideo. Li diris, ke en la komenca periodo post la fondo de Han-dinastio oni praktikis la politikon de parenciĝo por paco, sed la hunaj aristokratoj-sklavmastroj agresemaj rigardis tion signo de malforteco de Han-dinastio, perfideme faradis armajn invadojn kaj alportis grandajn suferojn al la popolo de Han-imperio. Tian kruelan barbaran malamikon oni ne povas bonigi per edifaj predikoj nek kontentigi per donaco de teritorio, tial Vudi ellaboris la politikon rezisti kontraŭ la hunoj, ekstermi barbarojn per justa armeo kaj protekti la vivon kaj posedaĵojn de



la popolo kaj defendi la landon. Nun, kiam la hunaj aristokratoj-sklavmastroj denove lokis multajn trupojn ĉe la landlimo, la kortego ja devis sendi trupojn tien por konstrui fortikaĵojn kaj plifortigi la defendon. Se oni malkonstruos la fortikaĵojn, tiam la hunoj povos invadi senbare kaj la kara teritorio de la lando falos en la faŭkon de la malamiko. Tio ja estas centprocenta kapitulaca kaj nacipereiga politiko!

En la kunveno, la konfucianoj propagandis konfucianismon, energie beligis la putran sklavan sistemon, kriaĉis por "restarigo de la antikva ordo" provante retropuŝi la historian radon.

Sang Hongjang montris, ke tio estas "ripeto de ideoj de mortintoj", estas "damaĝo al la nuna socio per arkaika politiko". Li diris, ke ŝanĝiĝis la epoko, do ankaŭ administrado de la ŝtato devas aliiĝi; por prosperigi la regnon, oni devas ellabori politikojn konformajn al la efektivaj situacioj kaj ne devas ĉiam agi kiel antaŭe. Li varme laŭdis la kuraĝon kaj historiajn kontribuojn de Imperiestro la Unua de Kin-dinastio, Ŝang Jang, Li Si kaj aliaj legalizistoj.

Post malkovro de la kaŝa intenco de la konfucianoj, ĉi tiuj konsterniĝis kaj elmetis Konfucion — la fondinton de konfucianismo por premi sian antagoniston, dirante ke la humana politiko estas instruo de la sanktulo kaj ne devas esti malobservata. Sang Hongjang montris, ke Konfucio estas hipokritulo "virta en vortoj sed malnobla en ago". Li estis obstina reakciulo, blinda antaŭ la aktualaĵoj, ĉie kolportis "humanan politikon" kaj ĉie malsukcesis. Li estis ne bonvena al la regno Lu, li estis elpelita el la regno Ki, en la regnoj Ĉen kaj Caj eĉ manĝon oni ne donis al li, kaj popolanoj de Kuangĉeng ĉirkaŭis lin kaj volis lin mortigi. Sang Hongjang plie senvualigis la malbelan vizaĝon de la konfucianoj, kiuj volis bonan manĝon kaj silkajn vestojn ne okupiĝante pri terkulturado kaj teksado, propagandis restaŭran kaj regresan konfucianismon, parolis bele sed kondutis malnoble.

Per elokventaj argumentoj kaj pruvoj Sang Hongjang venke defendis la progresan linion de la legalizistoj. La kunveno pri salo kaj fero finiĝis per hontinda malvenko de la konfucianoj.

---

## Kurantaj Aferoj

### LA UNUA PROFUNDA PUTO DE 6011 METROJ SUKCESE BORITA DE ĈINIO

Antaŭ nelonge, la laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de la putobora taĉmento n-ro 7002 de la Petrola Administracio de Siĉuan-provinco sukcese boris la unuan 6011-metran puton de Ĉinio per drilego produktita de nia lando, kaj tio markis novan nivelon de petrolputo-bora tekniko de Ĉinio.

La sukceso signifas, ke oni unuafoje traboris la tutan sedimentan rokon de Siĉuan-baseno kaj akiris valorajn materialojn pri la stato de profundaj tertavoloj enhavantaj petrolon kaj naturan gason, kio prezentas al ni vastan perspektivon por pliapaŝe ekspluati la riĉfontojn en ili. Dum la borado ili akumulis teknikan sperton en venko de alta temperaturo, alta premo kaj komplikeco de geologiaj kondiĉoj. Tio havas gravan signifon por renovigi la teknologion en mezurado kaj fortikigo de profundaj petrolputoj kaj por akceli la ĉinan geologian sciencesploradon kaj la disvolvadon de petrola prospektorado.

### PRINTEMPA FORSTUMADO

Observante la instruon de Prezidanto Maŭ **"verdigu la patrolandon"**, kaj venkinte malfavorajn kondiĉojn de malalta temperaturo kaj serioza sekegeco en la lasta printempo, la vasta popolo de norda Ĉinio en la urboj kaj la kamparo aktive faris printempan forstumadon kaj akiris rimarkindajn sukcesojn. Ĝis la dua tagdeko de aprilo, la forstumitaj areoj de Ninghia, Pekino, Tiangin kaj aliaj regionoj kaj urboj estis multe pli vastaj kompare kun tiuj de la sama periodo de la lasta jaro. Henan-provinco jam superplenumis la forstuman planon de la tuta jaro.

Nemalmultaj regionoj prenas forstumadon kiel unu el la gravaj taskoj en la fundamenta konstruado de kampoj kaj faris unuecan planon kaj sintezan aranĝon konsiderinte la kondiĉojn de la montoj, kavoj, kampoj, arbaroj kaj vojoj. La provincoj Hebej, Ŝandong kaj Ŝanhi multe konstruis forstozonojn sur ebenaĵoj. Iuj lokoj de nordorienta kaj nordokcidenta Ĉinio serioze plagataj de sablovento kaj grunda erozio, nun klopodas por konstrui pli kaj pli multajn protektajn forstozonojn.

### KORESPONDA EDUKO POR INTELEKTAJ GEJUNULOJ IRINTAJ AL KAMPARO

Por helpi la supre menciitajn gejunulojn lerni revolucian teorion

kaj kulturajn kaj sciencajn sciojn, lige kun la aktualaj klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado, la koncernaj fakoj de Pekino kaj ĝiaj gubernioj respektive starigis gvidgrupon por koresponda eduko por intelektaj gejunuloj. Nun tiun edukon ĝuas pli ol 100,000 intelektaj gejunuloj irintaj al la kamparo ĉirkaŭ Pekino.

Laŭ la realaj bezonoj de la kamparo, la postlabora koresponda eduko konsistas ĝenerale el 4 partoj: politiko, la hana lingvo, baza scio de agrikulturo kaj kampara medicino. La politiko estas nepre lernata por ĉiuj kaj unu el la aliaj tri kursoj elektata laŭbezone.

La ĉefa metodo de la koresponda eduko estas memstudo kaj samtempe oni donas necesan helpon. En lernado la lernantoj instruas unu al alia kaj helpas reciproke. Kiam ili renkontas demandojn en sia memlernado, ili povas letere peti klarigon de la fakoj, kiuj kompilis la lernobjektojn. La nomitaj gvidgrupoj invitis nombron da laboristoj kaj kamparanoj, kiuj havas praktikan sperton, kadroj, instruistoj, kuracistoj k.a. kiel kumulajn instruistojn por helpi la gejunulojn en lernado.

## ĈINAJ SPORTISTINOJ ROMPIS MONDAJN REKORDOJN DE ARKOPAFO

En la lasta tagdeko de marto ĉijare, en la urbo Fuĝoŭ de sud-orienta Ĉinio okazis la printempa arkopafa ekzamena konkurso de 1976, en kiu partoprenis pli ol 700 sportistoj el diversaj lokoj de la tuta lando. Vang Ven-gjuan, juna sportistino de Ŝanhajo, rompis per 310 poentoj la mondan rekordon de virina 70-metra solronda arkopafo. Vang Ven-gjuan, Guo Pej, alia Ŝanhaja sportisino kaj sportistino Zalga de la Interna Mongolio respektive rompis per 675,670 kaj 665 poentoj la mondan rekordon de 661 poentoj de virina 30-metra duronda arkopafo kreitan de la sovetunia sportistino Rustamova en la jaro 1975. Song Ŝuhian, sportistino de la Pekina Fizikokultura Instituto atingis per 618 poentoj la mondan rekordon de virina 60-metra duronda arkopafo.

## KVIN ARTAJ GAZETOJ ELDONITAJ

Sub la bonega situacio de profunda disvolviĝo de la batalo kontraŭ la vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn, la eldona rondo de Ĉinio lastatempe eldonis kvin landajn monatajn artajn gazetojn "Popola Opero", "Popola Filmo", "Popola Muziko", "Danco" kaj "Belarto", por plie prosperigi la socialisman verkadon, vigligi artan komentarion kaj kontentigi la bezonon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

## PLI MULTE DA RADIORICEVILOJ PRODUKTITAJ

En la lastaj jaroj, la produktado de radioriceviloj en Ĉinio estis ra-



*Sportistino Guo Pej*

pide disvolvita. La nombro de provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj, kiuj povas produkti radioricevilojn, jam pliiĝis de 13 de la jaro 1965 antaŭ la proleta kultura revolucio ĝis 29 de 1975. Ilia produktokvanto de 1975 pli-ol-11-obliĝis kompare kun tiu de 1965, kaj la specoj plimultiĝis de pli ol 40 ĝis pli ol 370. Samtempe kun multa produktado de ordinaraj radioriceviloj, Ĉinio produktis altklasajn radioricevilojn por plenumi diversajn bezonojn. La kvalito de ili estas multe levita. La produkta kosto kaj prezoj de detala vendo multe reduktiĝis.

### RAPIDE DISVOLVIĜAS LA TELEFOTOGRAFA KOMUNIKO

La poŝta kaj telekomunika institucio de Ĉinio akiris ĝojigajn sukcesojn en disvolvo de la telefotografa komuniko. Tio plene manifestis la forton de la popolamaso en scienca esplorado.

La telefotografa komuniko estas avangarda rimedo de komuniko. Ĝi povas rapide kaj precize komuniki al malproksimaj lokoj fotojn, vortojn, diagramojn kaj materialojn en iliaj originalaj formoj. Ĝi aparte konvenas al la ĉinaj ideografiaĵoj. En la lastaj jaroj, la poŝta kaj telekomunika institucio sukcese faris telefotografajn ekipaĵojn kiujn oni jam provis en cirkvitoj kaj vaste aplikas. Ekzemple, en la vasta Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, de ĝia ĉefurbo Huhehoto ĝis gubernioj, oni malfermis al uzantoj telefotografadon de soldirekta cirkvito kaj starigis komunikan reton de telefotografo.

### NOVTIPA MEZURA APARATO

Lastatempe, la Kemia Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj la Pekina Analiz-instrumenta Fabriko prove fabrikis en kunlaboro novtipan mezuran aparaton por determini surfac-areon kaj porograndecan dislokiĝon kun internacia avangarda nivelo kaj originaleco.

Tiu aparato povas esti vaste uzata en katalizo, elektrodo, kromatografio kaj branĉoj de petrolo, metalurgio, konstrumaterialo, nacidefenda industrio.

La ekspertizado de koncernaj unuoj konstatis, ke la kvalito de tiu aparato estas bona kaj atingis la projektan postulon: la strukturo racia, manipulado facila, mezurado preciza kaj determinado rapida.



*Vang Ven-gjuan (la dua de dekstre) kaj Song Ŝuhian (la dua de maldekstre) interŝanĝas sperton.*

*Sportistino Zalga (la maldekstra)*



## ESPERANTA ANGULO

# Bonvenon al geamikoj el UEA

Sinjoro E. J. Woessink, estrarano de UEA kaj lia edzino venis al Pekino je la 22-a de aprilo, survoje al Japanio.

Dum ilia restado en Pekino, la vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo Je Lajŝi kaj Ĉen Juan intervidiĝis kun ili kaj vespere de la 23-a Je Lajŝi regalis ilin per festeno. Gesinjoroj Woessink ankaŭ intervidiĝis kun geesperantistoj de koncernaj institucioj.

Gesinjoroj Woessink vizitis la popolan komunumon Ŝuangkiaŭ en antaŭurbo de Pekino, kaj tie ili estis varme akceptitaj de respondeculo de ĝia revolucia komitato. Akompanate de la mastro, gesinjoroj Woessink pririgardis kun intereso la bredejojn de laktobovinoj kaj anasoj kaj riparejon de agrikulturaj maŝinoj de la popola komunumo kaj ankaŭ vizitis hejmon de komunumano. Ili estis profunde impresitaj de la sukcesoj, precipe la alta produktokvanto de greno, atingitaj de la komunumo. La gastoj ankaŭ ascendis la faman monton Badaling kaj rigardis la imponan Grandan Muron.

Vespere de la 24-a de aprilo, respondeculoj de la redakcio de El Popola Ĉinio kaj Guozi Shudian regalis gesinjorojn Woessink per vespermanĝo kaj amike interbabilis kun ili. La gastigantoj esprimis dankon al UEA pro ĝia longa perado de El Popola Ĉinio.

Gesinjoroj Woessink flugis al Japanio je la 26-a de aprilo.

# Pentristeto

de GUOLIANG



# Kolora Filmo «Ĉunmiaŭ»



Tian Ĉunmiaŭ, la heroino en la filmo, legas dokumentojn pri la Granda Proleta Kultura Revolucio.



Li Akiang, la sekretario de la kompartia filio de la brigado, ĝoje diras al la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj: "Prezidanto Maŭ jam faris alvokon, ke oni metu la ĉefan forton de la higiena laboro en la kamparon."





Filineto de malriĉkamparanino Bofratino Afang grave malsaniĝis. Sed la komunuma hospitalo estas regata de la reviziisma higiena linio kaj la reakcia kuracisto Kian Ĝijen ĉiamaniere prokrastas la kuracon, tiel ke la knabineto mortis. Brakumante la knabineton Ĉunmiaŭ ekstreme indigniĝas.






Fariĝinte "nudpieda" kuracistino Ĉunmiaŭ tutkore servas al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ŝi portas la dekoktajon el la kontraŭepidemiaj drogherboj kolektitaj de ŝi al komunumanoj laborantaj sur kampoj.

Subtenate de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, Ĉunmiaŭ sukcese resanigis Lonĉjon, filon de Bofratino Afang, per akupunkturo kaj drogherba dekoktaĵo.




Direktoro de la komunuma hospitalo Du Vengie, enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, nuligis la sanitarejon de la brigado. Ĉunmiaŭ diras indigne: "Vi povas subpremi nin per instrukcioj de via superuloj, tamen vi ne povas ŝanceli nian decidon servi al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj."






La Granda Proleta Kultura Revolucio frakasis la reviziisman higienan linion. Ĉunmiaŭ kaj kuracisto Fang invitis malriĉkamparanon Onklon Ŝujĉang en la hospitalon por kuraci lin. Ĉunmiaŭ trinkigas al la onklo drogherban dekoktajon, kiun ŝi mem prove trinkis antaŭe.




Kune kun la medicinaj laborantoj de la hospitalo kaj la komunumanoj, Ĉunmiaŭ aktive malkovras kaj kritikas la krimon de la reviziisma higiena linio kaj kritikas Du Vengie.


# Skulptaĵoj el Ŝoŭŝan-ŝtono de ugian-provinco



La Pagoda Monto de Jan-an



La Heroa Ruĝa Armeo Transgrimpas la Neĝan Monton



La Ferĉena Ponto super Dadu-rivero




世界语《中国报道》一九七六年第七期（本刊代号：二——九一五）